

**Kálmán Mikszáth**

**Slovakaj samvilaĝanoj**

**Rakontoj**

**Traduko**



**2024**

**ISBN: 978-615-02-2441-1**

**Kálmán Mikszáth**  
**Slovakaj samvilaĝanoj**  
**Rakontoj**  
– Tradukaĵo –

**Originala nomo de la verkisto: MIKSZÁTH KÁLMÁN**  
**Originalaj nomoj kaj la eldon-datoj de la verko: Tót atyafiak:1881**  
**La esperantigo de la hungarlingva teksto de TÓT ATYAFIAK okazis laŭ la volumo eldonita de la Eldonejo Móra, Budapest, en 1978. Esperantiganto:**  
**László Pásztor**  
**Provlegantoj: Adrienne Pásztor kaj Pavol Petrik Lingva lektoro:**  
**Rob Moerbeek**  
**La aperejo de la hungarlingva teksto:**  
**Tót atyafiak: <https://mek.oszk.hu/00800/00895/00895.htm>**  
**La aperejo de ĉi tiu verko: <https://mek.oszk.hu/26600/26660/>**  
**Frontospica bildo:**  
**Altlandaj popolkostumaj slovakoj – Foto, gazetdetalo, 1892**  
**<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=35659>**  
**Originala nomo de la elhungariginto: Pásztor László**  
**Ĉiuj rajtoj rezervitaj**  
**Eldonrajtoj ĉe: Pásztor Lászlóné**

## **Slovakaj samvilaĝanoj**

### **Enhavo:**

<b>1/ La or-fraŭlino .....</b>	<b>4</b>
<b>2/ Tiu nigra makulo .....</b>	<b>19</b>
<b>3/ Lapaj, la fama sakflutisto.....</b>	<b>31</b>
<b>4/ Neniĝo de la bando de Jastrab .....</b>	<b>43</b>

### **KARIERO DE LA VERKISTO:**

**[https://eo.wikipedia.org/wiki/Kálmán Mikszáth](https://eo.wikipedia.org/wiki/Kálmán_Mikszáth)**

## La or-fraŭlino

### Enkonduko

Miaj sinjoroj! Se foje la diabloj en la infero pensus, ke ili konstruos urbon, tiu urbo nedubeble tia estus, kia estas Ŝelmecbánya.<sup>1</sup>

Pardonu la tiea inda magistrato ĉi tiun mallaŭdegon, kiun mi ne diras kiel ofendon, aŭ kiel primokon, precipe koncerne la vivantojn, kiuj certe ne kulpas, ke iliaj prauloj konstruis siajn domojn sur ĉi tiun strangan lokon. Kara leganto, kiu ankoraŭ ne estis en ĉi tiu eksterordinara lando, imagu tri mil montopintojn kaj samkvantajn valkaldronojn, multe da rokoj, kie dense estas enkonstruitaj multe da diversformaj domoj, kies frontopartoj estas tri-etaĝaj, sed la malantaŭaj partoj strikte premiĝas al la monto.

Se ni trairas ĝisfine ĉi tiun urbon ŝtonitan de la naturo, tiam la koro plenpleniĝos kun homamikaj sentoj kaj vi suspiros emociiĝinte: „Ĉu ankaŭ ĉi tie loĝas homoj?”

La regiono estas dezerta pejzaĝo, malbonaĉa kaj la vetero estas rigora.

La ventneĝa, ŝtormvetera Szitnya (sitnja), la plej alta pinto de la montaro Ŝelmec, „la amanto de la nuboj”, perforte tiras al si siajn amantojn, kien ajn ili iras.

Se tiu ne havas nubon, simile al neglektita fraŭlino, tiam ĝi estos furioza. Se ne pluvas, tiam blovas tra la stratoj kaj stratetaĉoj.

Ĉi tio estas malĝoja urbo! Ĝia aero estas venena por la homoj, inundante el la minejoj kaj pro ĝia akvo estiĝas strumo sur la kolo de la palaj fraŭlinoj kaj stultaj viroj. El inter la sescent varbitaj militservo-devaj junuloj nur kvar junuloj estis taŭgaj por esti „homoj de la imperiestro”. (Mi preskaŭ hontas priskribi ĉi tion.)

Mi vidis iun maljunan virinon iam antaŭ la domo de la direktoraro de la minejo, kiu lace pene portis anhelante dorsosakon korboforman, kiu iris supren kaj malsupren sur la monton. Nome en Ŝelmecbánya oni iras kaj supren kaj malsupren, sed tria eblo ne estas.

El la dorsa korbo flugis terure granda fumo. Mi kredis, ke iu ŝia varo ekbruliĝis en la korbo kaj mi kriis al la malfeliĉa sinjorino:

– Onjo, via korbo brulas!

Ŝi ridetante turnis al mi sian stanogrizan vizaĝon kaj kun patrina fiero diris:

– Ej, ne! Náckó pipfumas en ĝi!

Fakte estas, ke iu bubo sidis en la korbo, kiu estis adoleskanto kaj jam pipfumis. Lia panjo devis pene porti lin sur dorso sia.

La ĉiela providenco nur en Ŝelmecbánya estas la plej partiema en la tuta mondo. Por Ŝtevo Csemez (ĉemez) loĝanta sur la montosupro, la suno pli frue leviĝas kaj pli frue subiras, ol por Ŝtevo Kutlik loĝanta montosube, kaj ĉi tie estas ankaŭ specialaj trafikaj geografiaj rilatoj.

Kristina Csemez ekzemple staras post tagmanĝo ĉe la verda pordego de la domejo kaj kiam ŝi vidas per siaj nigraj okuloj, ke sur la najbara montospino Bohuška Mirkovská<sup>2</sup>, la fraŭlino de la ŝatata familio, promenas en la ĝardeno, Kristina kun sia belega kapo afable kapsignas kaj sonorilsone transkrias al ŝi:

– Ĉu vi jam tagmanĝis, Bohuška?

---

<sup>1</sup> La iaman hungaran urbonomon Ŝelmecbánya, bonvolu elparoli ŝelmecbanja. En la setleja minejo oni minis arĝenton. Pri la malnova hungara mineja setlejo, nun slovakia ubo, bv. legi abunde ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Bansk%C3%A1\\_%C5%A0tiavnica](https://eo.wikipedia.org/wiki/Bansk%C3%A1_%C5%A0tiavnica)

<sup>2</sup> La familionomo Mirkovsky elparolendas mirkovki, sed la virinajn membrojn de tiu familio oni nomas Mirkovská, kiu nomo elparolendas mirkovska.

Bohuška turnas sin aŭdante la konatan karan voĉon kaj kuras al Kristina ĝis la rando de la montospino, kie komenciĝas granda profunda fendego. Inter ili estis dudek paŝoj da distanco kaj ili povis babiladi laŭŝate.

– Ni forgesis tion. Kie vi estos hodiaŭ?

– Ĉi-hejme. – respondis Kristina.

– Vi estas ĉiam hejme. Estus bone, se vi venus al ni posttagmeze.

– Mi irus volonte, Bohuška, nome mi havos neelteneblajn gastojn. Tiuj estas malbelegaj, aĉaj gastoj.

– Nu, diru al mi! Kiuj estas tiuj malbelegaj, aĉaj homoj? Ĉu ili estas vere malbonegaj?

La bela Kristina ekridis. Ankaŭ Bohuška ridis. Efike de tiu belsono, la najtingaloj ĉesigis siajn trilojn en la vepro kaj aŭskultis la pli belan voĉon. – Ĉu ili estas aĉaj? Mi scias tion, Bohuška. Ĉi tie estos denove la maljuna grafo pri minejo kaj profesoro Csutkás.<sup>3</sup>

– Ho, ve! Kristina! ... Vere vi devas fuĝi al ni!

– Mi volonte irus al vi, se via domo ne estus tiom ege malproksime. Fakto estas, ke de la domo de Csemez<sup>4</sup> ĝis la domo de Mirkovsky<sup>5</sup> oni devis perpiedi unu kaj duonan horojn, nome oni devis supreniri ĝis la luterana templo kaj apud la katolika templo devis supreniri sur la ŝtuparo al iu kvarangula lignotura konstruaĵo, de kie on jam povis iri sur bona vojo ĝis la domo de Mirkovsky.

– Tio ne estas malbono, mia Tini<sup>6</sup>, mia Kristina!

– Mi ne povas iri, Bohuška! ... Pli frue se mi vizitis vin, kaj iĝis vespero, tiam mi povis pasigi la nokton ĉe vi. Sed nun mi ne povas fari tion. Ja vi scias la kaŭzon.

Kristina ruĝiĝis. Ŝi iĝis feinkolora, kiun koloron ankaŭ la ĉielarko povus envii.

– Vi pravas! ... Tiu kaŭzo estas nia petola filo, mia frato. Kiel vi memoras tiun – respondis Bohuška malŝate, mi jam forgesis lin, li ne ekzistas por mi.

Kristina senvorte rigardis al la valkaldrono, kie ekviviĝis la terbuloj de iu fefabelo kaj la domtegmentoj nigrigitaj de la tempo komencis movi sin kvazaŭ ili volus ekiri al Bakabánya.<sup>7</sup>

– Vi venu al ni! – lanĉis Kristina, sian tulo-tukon tirante antaŭ sian vizaĝon tiel, ke nur ŝia mentono videblis. Unu peceto el la ĉielregno.

## Unua Ĉapitro

*Sinjoro instruisto Csutkás kaj Demetrio Luppán estas prezentataj al la kara leganto*

La geedzeco certe estas unu el la plej belaj aferoj en ĉi tiu regno de la ombroj. Dio gardu min por kontesti kontraŭ la sekva generacio. Nome se ni trinkis el la ŝucira fluidaĵo el la botelo, laŭ la logiko de la iama anekdoto cigana, tiam ankaŭ la gejunuloj trinku tion.

Do, se mi ne riproĉas la sekvan generacion, tiam mi ne havas kialon por riproĉi ĝentlemanon Demetrio Luppán (lupan) kaj la sinjoron instruiston Csutkás (ĉutkaŝ), ĉar ili volis iri en tiun varmakvon havantan banejon, el kiu ĉiuj homoj sopiras eliri jam, kiam iuj enestas.

---

<sup>3</sup> La familianomo Csutkás, elparoleblas: ĉutkaŝ

<sup>4</sup> La nomo Csemez, elparoleblas: ĉemez

<sup>5</sup> La familianomo Mirkovsky elparoleblas: mirkovski.

<sup>6</sup> La karesnomo de Kristina estas Tini.

<sup>7</sup> Bakabánya, slovaknomo Pukanec, minista vilaĝo (pri arĝento) estis fondita en 1075, tiutempe apartenanta al abatejo.

Sed pli granda malbono estas, ke ili volis iri en la saman banujon, ja ili estis longtempe tre bonaj amikoj.

Ne estas miraklo, ke ili neniam forlasis kaj reciproke estimis unu la alian. Ili samforme pensadas, kaj kune laŭdadas, gapas Kristinan, la filinon de Stefano Csemez, dum fine ili profunde enamiĝis en ŝin.

Estas kompreneble, ke tio okazis tiel kaj ne alimaniere. Samtempe floriĝis en ilia koro la „malfrua somero” kaj la sama floro ekfloris en la seka grundo.

Nur tio estas mirinda, ke sinjoro Stefano Csemez neniam estis enamiĝinta en iun. Ili tri estis unu animo en tri korpoj, kaj inter ili neniam estis sensenca diskuto, escepte la ĝuon de la flartabako. Pri tio ili estis memstaraj fakuloj. Ĝentlemano Luppán asertis tion, ke la flartabakon oni devas enspiri tiel, kiel la magneto tiras al si la ferpulvoron. Pro tio la flartabakon ne estas permesate meti tuj al la naztruoj, ĉar pro tio malpliigas la ĉiela volupto.

Sed la sinjoro instruisto Csutkás (ĉutkaŝ) tiun principon ne povas akcepti. Nome la naztruojn oni devas plenplenigi de la tabakpulvoro. Tiun faron oni devas fari belforme, la flartabakan skatolon oni devas teni sub la nazon por bari, ke eĉ unu peco de la flartabako eniru. Nome ankaŭ tio malpliigas la volupton. Se tiu movo estas bone farata, tiam sufiĉas fascini la sinjorinojn. Ankaŭ sinjoro Csemez simile asertas tion, sed laŭ li estas stultaĵo por teni la skatolon sub la nazo. Nome la arte falantan tabakon prenos la lango. Laŭ sinjoro Csemez ĉi tio estas la ĝusta metodo, kiun li ĉiam defendos.

Krom tiu ĉi opinidiferenco nur iu fakulo profunde konante la homojn povas trovi iom da similecoj inter ili. Ja iliaj figuroj iĝis preskaŭ samformaj pase de la tempo, ja, ankaŭ ilia hararo samformis, ekde kiam sinjoro Csutkás ekportis perukon. Sed ne estas superflue, se ni prezentas detale sinjorojn Luppán kaj Csutkás. Profesoro Csemez estas facile prezenti, ja ĉiuj konas lin.

Sinjoro Csutkás, laŭ sia pasporto, estas la jena:

Lia religio: luterana.

Lia naskiĝloko: Podzamčok<sup>8</sup> en la departemento Trenčén<sup>9</sup>.

Lia aĝo: kvardek-ok jara.

Lia vizaĝo: ovala.

Lia nazo: normala.

Liaj okuloj: bluaj.

Lia hararo: griziĝante blonda.

Lia rimarkebla rekonilo estas: lia nazo estas ruĝa.

Ĉe la ĝentlemano Luppán la pasporto havas iomajn diferencojn. Li havas ovalan vizaĝon kaj lia nazo estas: malhelblua.

Nun ni konsideru ilian spiritan mondon. Sinjoro, la instruisto Csutkás estas entuziasma pedagogo, kiel Pestalozzi<sup>10</sup>, laŭ kiu la instruado tiam estas sukcesa, se liaj gedisĉiploj ŝatas lin, tio estas lia premio, kaj tion li diras fanfaronte ĝis enuo. Li multe parolas, meditante sidas inter siaj du amikoj kaj enspiras el la flartabako kaj murmuradas mallaŭte: „Ili pendas sur mi” (iliaj okuloj pendas sur mi, pro ŝato tre atentante min).

---

<sup>8</sup> La setlejo havas la vidindaĵon fortikaĵon de Podzamčok, alinome la fortikaĵon de Dobronya (dobronja), kiu estas konstruita apud la grava komerca vojo kondukanta el la centro de la Hungara Reĝlando al Pollando – apud la Via Magna.

<sup>9</sup> La departemento estas ricevita nomon pri la fortikaĵo, en Slovakio. Pri la departemento vi povas legi abunde ĉe, <https://eo.wikipedia.org/wiki/Tren%C4%8D%C3%ADn>

<sup>10</sup> Johann Heinrich PESTALOZZI estis pedagogo, li enkondukis propran metodon pri la instruado kaj edukado: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Heinrich\\_Pestalozzi](https://eo.wikipedia.org/wiki/Johann_Heinrich_Pestalozzi)

Poste li fermas la okulojn tiel ŝajne, kvazaŭ li aŭskultus siajn amikojn kaj dume kapbalancadas, jesadas, dormetas kaj vekiĝas, kiel kokido, kiun oni balancas.

– Jes, jes ... ili pendas sur mi ... ili ŝatas min ... li abrupte vekiĝante gapante rigardas ĉirkaŭen.

Liaj amikoj jam scias, ke la esprimo „ili pendas...” signifas, ke liaj disĉiplinoj ŝatas lin. Ili jam konis longtempe tiun krion kaj laŭ ili tio estas natura. Sinjoro, la instruisto estas prestiĝon havanta viro, kvankam en lia pasinto ne estas tiom gajaj kaj malgajaj memoraĵoj, kiom en la vivo de la ĝentlemano Luppán. Notinda estas tamen iu mirinda okazintaĵo en lia vivo, pro kiu li iĝis grava figuro en la rekta proksimeco de la literaturhistorio. Jes! Li estis poezia profesoro de Sándor Petőfi!<sup>11</sup> Aŭdu, miaj sinjoroj! Li estis instruisto de Petőfi! Ĉu iu edukis pli elstaran homon por la nacio, ol li? Neniu. La faktoj pruvas tion.

Oni mencias la poeton naskita nome. Ankaŭ la sinjoro instruisto Csutkás parolas pri li jene, kvazaŭ, mem Sándor Petrovics (ŝandor petroviĉ, nome Petőfi) skribis iam pri la profesoro; ke tiu donis malkontentigan noton pri lia poemfarada scio, sed ĉiuj scias, ke tiu malpravas, ja la faktoj pruvas.

Ja ekzistis en la lerneja arkivejo la aŭtentika klasikado, laŭ kio la profesoro donis bonan kvalifikan noton al Petőfi. Nome li rekonis ties talenton. Pri Petőfi ekzistas ankoraŭ iu legendo, kiu okazis en Ŝelmec, pri kiu ĉiuj scias ion, sed tute neniun konas tion, nur sinjoro Csutkás, la instruisto. En la liceo generacioj postsekvas unu la alian, kiuj gardas la legendon. La legendon transdonas la antaŭuloj al la posteuloj. Ĉiuj memoras tiun, pro kio, tiu vivos ĉiam. Mi ankoraŭ ektrovis tiun post dudek kvin jaroj post la foriro de la poeto.

Se sinjoro Csutkás volus rakonti tion! ... ja pri li okazis la legendo. Sed sinjoro Csutkás ne estis tiu homo, kiu ne volus rakonti ion, ja li estis bona homo, kiu volas akiri bonan ŝaton al siaj amikoj kaj ĉion faras por iliaj ŝatoj. Sed li ne estis kapabla longtempe paroli, escepte la lernejajn prelegojn kaj la flartabakadon. Li havis tridek jaran instruistan karieron kaj ne estis kapabla paroli pri iu ajn temo krom la lernejaj prelegoj.

Nur la vino kapablas paroligi lin, ĉar li ofte drinkas vinon, pro kio li rakontas ĉiam la legendon. Li rakontis plurfoje, ke Petrovics loĝis sur la monto leviĝanta super la liceo, ĉe la maljuna Musur; ĉe la hajduko de la Komerca Ĉambro. Ties filo hejmenvenis el la Legio el Italio kaj portis kun si kiel distingon, sur iun nomkarton gluitan ĉifoneton, per kiu oni kompresadis la sangon piedon de la vundiĝinta Garibaldi<sup>12</sup>. Ĉu ekzistas pli merita ordeno, ol tiu? Ĉu ekzistas pli granda heroo, ol Garibaldi? Kiu diras, ke tia ekzistas? Neniu. Sed sinjoro Csutkás al neniun konsilus, ĉar li riproĉus tiun per siaj argumentoj, ĉar tiuj argumentoj estas efikaj armiloj ... kiu ne kredas tion, al tiu li pruvas tion. Sed ni konsideru iun kazon de carino Katarina la 2-a, kiu daŭrigis la kreon de la rusa grandpotenco kaj grandigon de la imperio.

Laŭvorte sinjoro Csutkás nun ne rakontis la originalan temon kaj kiam li daŭrigos tion, tiam li estos ege dormema, lia kapo falas surtablen kaj en duonsongō li balbutas: „ili pendas...” kaj jam dormas.

Ĝentlemano Luppán jam estas malsama homo. Li estas parolema, sincera homo, kiu rakontas siajn memorojn. Li rakontas tiujn aferojn, kiuj ne okazis pri li, nur li imagis, ke li travivis tiujn.

Pro la malĝojaj memoroj li emociiĝis, ploris, sed tamen rakontis tiujn, ĉar tuŝas lin bonvene la pia malĝojo.

---

<sup>11</sup> Pri la granda hungara poeto vi povas legi abunde, ĉe:  
[https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1ndor\\_Pet%C5%91fi](https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1ndor_Pet%C5%91fi)

<sup>12</sup> Giuseppe GARIBALDI estis itala patrioto, militestro. Pri li bv. legi pli abunde ĉe:  
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Giuseppe\\_Garibaldi](https://eo.wikipedia.org/wiki/Giuseppe_Garibaldi)

De la parolo lia vizaĝo estos milda kaj iĝanta en inspiritan staton. Ankaŭ lia voĉo estos milda, kiam li rakontas sincere, emociigante pri la morto de sia karmemora edzino, kiu kuŝis sur sia malsanula lito luktante kontraŭ la neniigo. Li maldormis tage – nokte apud la agonianta patrino de siaj infanoj trabrakumante la infanojn dum, ŝi diris al li lace: „Ne ploru, ja mi revenos por vi kaj kunportos vin.”

... Poste ŝi kunportis baldaŭ ambaŭ infanojn.

La eta Laĉjo<sup>13</sup> post duonjaro mortis pro pulmito. Ho, ve, mia Dio, kiome saĝa, kara infano li estis. Luppán povus paroli pri Laĉjo kaj la eta Estera, sed li ne estis kapabla paroli pro la plorego.

... Sed la diritaĵoj ne okazis. Ĉiuj ŝelmecanoj konas lian pasinton, infanaĝon, do li neniam havis edzinon kaj infanojn.

Kvankam oni scias tion, neniuj diskutadas pri tio, ja ili kredas li ne estas mensmalsana. La „grafo pri minejo” ne estas frenezeta. En Ŝelmec ankaŭ la filo heredas la titolon de la patro.

Sinjoro Luppán estas brava, honesta homo, sed maljuna fraŭlo. Li estas vere eksterordinara maljuna fraŭlo.

Laŭ multe da homoj pro tio li iĝis maljuna fraŭlo, ĉar iam li ege amis iun junan belan fraŭlinon, sed ŝiaj gepatroj ne volis, ke ŝi estu lia edzino. La fraŭlino iĝis malĝoja, venenis sin kaj multe suferante mortis. Luppán havis tro senteman animon, kiun ege kortuŝis la morto de la fraŭlino, li feбриĝis kaj nur ege malfacile saniĝis.

Dum lia malsano daŭris, la multe menciita familia vivo, kiam naskiĝis, kreskadis kaj mortis liaj ŝatataj Laĉjo kaj la eta Estera, ...

Nun jam prezentinte la sinjorojn ni povas rakonti la duan ĉapitron, kiu ne estos enuiga kiel estis la unua.

## Dua Ĉapitro

*La pluko de tiu malgranda floro – la floron volas pluki tri manoj*

Ĝentlemano Luppán kaj sinjoro Csutkás, kiel Kristina jam menciis, hodiaŭ posttagmeze estis gastoj de sinjoro Csemez por kartludi. Ili partoprenis alterne por kartludi, nun ĉeestis ĉe Ĉemez, kiu estas la „orfaranto.” La aliaj du nomis lin laŭ tio, ĉar li konstante cerbumis pri farado de oro. Li ĉiun nocion esprimis per oro. Ekzemple li diris, ke la pluvo de majo egalas al unu kvintalo da oro. Se li laŭdis iun disĉiplon, tiam li diris, ke lia menso kaj diligento estas valora kiel oro. Se Csemez deziris al iu bonon, tiam li diris: „oro estiĝu ĉiuj viaj haroj.” ktp. Tiuj estis liaj eraroj, sed tiujn oni povis pardoni al li.

Do, ili kartludis en la ĝardeno vitlaŭbo. La vito kreskis malforte en la sennutraĵa grundo de Ŝelmec, malmulte da ŝosoj estiĝis kaj la suno sendis siajn varmegajn radiojn al la vitlaŭbo. La tie estantaj personoj ege ŝvitis. Sed feliĉe, la bela Kristina diligente portadis refreŝigan bieron, pro kiu ili iĝis viglaj kaj maldormemaj. Somerkulmino estis. Kristina sidis apud sia patro, konsideris la kartojn de sia patro, kiuj certe estis bonaj, ja multe li ekkriis:

„Mi havas orkartojn!”

Sed ĝentlemano Luppán kaj sinjoro instruisto Csutkás estis hodiaŭ malespere malgajnintoj, ĉar la tri atutoj ne funkciis ĉe ili. Ili pacience toleras la malgajnadon, nur sinjoro Csemez miras pri tio. Ankaŭ eldiri estas terure!

– Vi estas hodiaŭ veraj orminejoj. Jam mi gajnas la kvinan forinton! Kristina! Portu ankoraŭ glason da biero por ĉiuj!

---

<sup>13</sup> La karesnomo de la hungara virnomo László /laslo/– hungare Lacika, esperantonome Laĉjo estas.



La kara infano ekstaris kaj iris al tiu sitelo, kiu ripozis en ombro de la rozujo. En la sitelo estis inter glacio la kruĉoj. El iu kruĉo ŝi verŝis unue al sia patro bieron kaj poste al la aliaj. La pli lastaj dankeme akceptis la bieron rigardante la belajn manojn de la fraŭlino.

Tiuj rigardoj estis ege fascinaj, kiuj esprimis amsopiron, esperon kaj kontentecon. Ja ili povis esti kontentaj pri ŝi. Ŝi estis belega, kvazaŭ ne patrino naskintus ŝin, sed la imago de la poetoj, kiu flugas super la universo. Ŝiaj vizaĝo kaj lipoj estas similaj al la feinfloroj, ŝia frunto similas al la ĉielvolbo, ŝia staturo ŝajnas kiel la susuranta kano, la okuloj brilas kiel diamantoj, ilia koloro prunteprenis sian similecon de la malhelo de la nigra nokto. Esence ŝi estas „ĉi tia vira idealo. Ankaŭ la brava sinjoro estas simila, kvankam lin nur la oro interesis, li rigardis deflanke sian filinon pensante, ke ŝi estas vere fraŭlino. (Kiome kreskas la infanoj!) Li murmuris en si:

„Jen, kiom belega damo ŝi estas!”

Kiam foje Csutkás diris al li inter kvar okuloj: „Nu, vi ricevis tion, kion vi sopiris, vi akiris oron, ja vi ektrovis la oran Kristinan.” Pro tiuj vortoj li ekhavis mirindajn pensojn. „Vere, ĉi tiu fraŭlino estas vera oro.”

Poste li rememoris la diversajn kavalirajn romanojn, kiujn Luppán rakontis multe. Laŭ ili: riĉaj princoj kaj reĝidoj venis el siaj fortikaĵoj por viziti la malriĉajn junpaŝtistinojn, kiuj havas neĝblankajn manojn, dum la princoj kaj la reĝidoj havis brilajn kronojn. La reĝido genuas al la piedoj de la junulino kaj diras mallaŭte: „Vi, junulino, interŝanĝu kun mi; estu viaj manoj la miaj kaj estu mia krono la via.” Ja tio estas granda frenezaĵo, sed povas esti, ke tio okazas, ĉar se tio ne okazus, tiam tiuj ne havintus historion.

– Ŝtevo, Via oro estos ĉiam pli kaj pli granda. Baldaŭe ŝi estos junedzino kaj iu forportos ŝin.

Sinjoro Csemez konsterniĝinte rigardis sian indan kolegon.

– Ĉu oni forportos ŝin? Ho, ne. Mi donos ŝin al neni.

Sinjoro Csutkás kapbalancis kaj eltiris sian poŝtukon el sia poŝo, li ekskuis tiun por konvinki, ke liaj studentoj hazarde ne skuis sur tiun paprikopulvoron. Poste li viŝis sian fronton ŝvitantan:

– Ho, ne! Ili pendas sur mi ... jes, jes... sed tio estas mia opinio, ke via opinio ne estas pripensita... nome la virino havas gravan celon.

– Kion?

Sinjoro Csutkás ege ruĝiĝis. Li faris nodon sur sian poŝtukon kaj tiun komencis maĉadi.

– Mi tion kredas kaj kuraĝas aserti, ke la celo de la virino estas la edziniĝo. Grava afero estas la amo... Ho, kiom ili pendas sur mi... La maljuna orfaranto havis sian antaŭan opinion.

– Mi donas al neni Kristinan. Mi edukis ŝin ne pro tio, ke iu bubaĉo forportu ŝin.

– Sed estas bezonata ankaŭ la altiriĝo kaj la amo!

– Ŝi amu min!

– Tio ne sufiĉas!

– Ŝi amu ankaŭ vin!

Csutkás subite fermis la okulojn kaj ridetis.

– Al la koro ordoni malfacilas. La koro havas rajtojn. Ŝtevo, vi ne konas la koro. La koro estas stranga kreaĵo kaj facile rompiĝas.

Sinjoro Csemez oscedis kaj diris ne tolerante kontraŭdiron, ke la rompita fenestrovitro donas pli grandan bruegon, ol la rompita koro. Ne estas bone perdi la tempon pro babilaĉo. Pli bone estus iomete kartludi. Li donas Kristinan al neni, sed povas esti, ke li donas ŝin por tiom da oro, kiom peza estas Kristina.

Sinjoro Csemez ruze palpebrumis kaj grimacadis montrante sian langon.

– Tio estas interesa penso! – suspiris Csutkás rigardante sian sigelringon sur lia fingro, dum li pensis: kiom bele aspektus apud ĝi la ringo geedziĝa pri Kristina. Ĉi tiu dialogo pri Kristina okazis antaŭ duonjaro, kiun ili nun ne memoras.

Kristina hodiaŭ estis ege bela, kiel ŝi iradis inter la sinjoroj. Bona estis la biero kaj la flartabako. Csutkás treege bone fartis. Li pagis la malgajnitan monon, li kolektis la kartojn, miksis tiujn kaj subite rapide metis tiujn en sian poŝon.

Post lia aŭdaca faro sekvis granda silento. Kio estos nun? Ĉiuj rigardis lin. Csutkás elprenis sian flartabakon, li metis ĝin sur la tablon kaj lian manon metis sur ĝin, ja li preparis sin feste paroli.

– Miaj sinjoroj! Mia fraŭlino! Vi diros, ke ili pendas sur mi! Jes, sed...

Li drinkis unu gluton da biero kaj mallaŭte daŭrigis:

– Sed tio ne sufiĉas! Kiu diras, ke tio sufiĉas? Nek vi ĝentlemano diras, nek vi diras Csemez, nek mi diras. Sed ni devas klopodi esti sufiĉaj. Mi serĉas koron, miaj sinjoroj kaj mia fraŭlino!

Ĝentlemano Luppán suspiris kaj kapbalancis.

– Ankaŭ mi! Niaj celoj estas samaj. Depost kiam mia malfeliĉa karmemora edzino mortis...

– Nu, disdonu la kartojn – interparolis la orfaranto.

Csutkás ekstaris kaj liajn manojn etendis al Kristina kaj ŝia patro. – Krome tiu koro estas ĉi tia, Ŝtevo, – li kriis entuziasme – mi ektrovis ŝin ĉi tie, Kristina pendos sur mi, se ŝi estos la mia, se vi donos al mi. Nome mi amas ŝin. Ŝi estos feliĉa apud mi kaj ŝi pendos sur mi. Ŝi estos mia edzino. Vi devas doni ŝin al mi, ĉar mi amas ŝin... mi feliĉigos ŝin... ŝi dependu de mi.

Poste li forte ekpemis la manojn de Kristina kaj Csemez, fermis la okulojn kaj atendis la respondon de Csemez. Csemez ĉirkaŭrigardis embarase, la fraŭlino staris pale kaj tremetante. La pli lasta vane klopodis liberigi sin, sed sinjoro Csutkás forte premis ŝian manon.

– Kio estas via opinio, Luppán? – demandis Csemez flegme la ĝentlemanon Luppán.

– Tio estus la plej bona, se vi al mi donus manon de Kristina. Nome ŝi ege similas al mia karmemora edzino. Ankaŭ tiun lokon mi kisas...

Luppán viŝadis la okulojn per sia poŝtuko emocie, sur kiu estis la blazono de la familio Luppán. En la blazono estis du marteloj unu la alian krucante kaj iu surskribo: „Estu feliĉa!”

Sinjoro Csutkás delasis la manojn de Csemez kaj Kristina kaj terurigan rigardon ĵetis al la ĝentlemano.

– Mia sinjoro! Vi ekvidis miajn pensojn, volas akiri la fraŭlinon, atakas min ... Nu, estas bone! Sed notu bone ... ŝi pendas sur mi. Ĉu mi pravas, Kristina?

Sinjoro Csutkás ĉirkaŭrigardis, sed nenie vidis Kristinan, kiu kuris el la ĝardeno al la domo, kiel iu ektimigita kapreolido. Ŝi estis flamruĝa kaj forte anhelis. Kio okazis pri ŝi? Kio okazos nun?

Sed dum la blinda kurego iu haltigis ŝin.

– Hola! Ho, hoj!!

– Ja ili estas la gefratoj Mirkovsky!

Fakto estas, ke tie estis Bohuška kaj ŝia frato, Nikolao Mirkovsky. Kun tiu petola Nikolao ŝi kutimis babilaĉi, inter ili estis la fendego kaj pro ĝi ŝi ne povas fari viziton ĉe Bohuška, ja li iĝis plenkreskulo kaj...

Kristina denove iĝis pala, ektimis, malfortiĝis kaj staris antaŭ ili, kiel kadukiĝinta marmorstatuo.

– Ĉu vi ne kisas min? Vi rigardas rigide – plendis Bohuška – ĉu vi koleras – je mi ĉar mi kunportis Nikolaon?

Kristina skuis la kapon malĝoje.

– Tio estas mia kulpo, – daŭrigis Bohuŝka. – Batu min pro tio. Li ne kuraĝis veni, mi kuraĝigis lin. Kial vi estas pala kaj eskscitita? Ĉu okazis io?

Kristina kapjesis malforte. Poste ŝi saltis apud Nikolaon kaj metis sian manon en manon de Nikolao.

– Ĉu vi tre, treege amas min?

Bohuŝka surpriziĝis, gapis sian amikinon, kiu tenere premetis sin al Nikolao. Nikolao iĝis ege ruĝa kiel flamo de fajro. Ja ili ankoraŭ tute ne paroladis pri ĉi tio. Ili babiladis nur kelkfoje. Kaj jen, nun!...

– Jes, mi ege amas vin! Ho! Bohuŝka, diru al ŝi, ke mi amas ŝin treege! Mi ne estas kapabla diri tion. Sed mi amas ŝin ekde komenco!

Nikolao tremetadis kiel poplofolio.

– Jes, – ŝi diris denove – vi estas pli bona, ol la aliaj. Amu min kaj mi... – Ĉu vi, Kristina?

– Ĉu mi? – ŝi delasis lin – ĉu mi? Kiu parolas pri mi? – ŝi diris modeste: ĉu vi ne sentas teruran varmegon?

– Ni iru en la vitlaŭbon, – lanĉis Bohuŝka – kiu estis fascinita pro la sceno.

– Ne! – kriis Kristina. – Tien ne!

– Kien ni iru? – demandis Bohuŝka.

– Kien ajn! En la mondon. – diris Kristina amare, kaj iu larmoguto aperis sur ŝia vizaĝo.

Nikolao suferante rigardis tiun larmoguton pensante, ke estus bone kisi tiun feinan vizaĝon.

### **Tria ĉapitro**

#### *Pri tiuj okazintaĵoj, pri kiuj ne temis en la antaŭa ĉapitro*

Nikolao Mirkovsky estas unu el inter tiuj figuroj, pri kiuj la virinoj diras, ke estas „interesaj.” Li estas parolema. Li havas densan blondan hararon, atletforman staturon kaj lertan teniĝon. Antaŭ duonjaro li venis hejmen por kompletigi siajn jurajn studadojn en la Akademio de Ŝelmec pri la minado kaj se li havos bonŝancon, li komencos labori kiel konsilanto pri minejo. Li povas atingi tiun celon, ja li estas talenta kaj kapablas konformiĝi al la cirkonstancoj. Dum la duonjaro li iĝis havanto de ĉefa voĉo en la kluboj de la gejunuloj kaj ĉe la restoracioj: „Ora Meĉo” kaj la „Vigla Martelo” de Ŝelmec, sed ankaŭ en la virinaj salonoj. En tiuj lokoj li ne estis tiel mallerta kiel nun, kiam li staris antaŭ Kristina, kvazaŭ liaj piedoj enradikiĝintus, kaj nevolante kaptadis la foliojn de la robinio kaj demandadis la foliojn: „Ĉu ŝi amas min? Ĉu ŝi ne amas min?”

Li ne komprenis, kial ploras Kristina, ja ŝi diris, ke ŝi amas lin? Kial ŝi delasis lian manon? Kial ŝi iĝis meditanta? En la virina koro estas enigmo, tio estas poezio kaj ombro de la realaĵo.

Ho, la unua ama konfeso estas poeta vorto. Tio estas la plej vera preĝo. La herboj suspiras al la bela fraŭlino: „Paŝu ĉi tien, piedtretu sur min kaj mi estos pli verda, ol pli frue.” La sunradio diras al la junulo: „Ankaŭ vi havas unu mondon, kiu estas pli granda, ol la mia, ankaŭ pli bela.” La proksimiĝanta vespera krepusko diras al la nokto: „Ne venu, forrestu, pro la okazaĵoj ne povas esti malhele. Kiuj diris ĉi tiujn vortojn, tiujn la universo aŭskultis pie, la geamantoj staris mute kaj atendis, kiam falos sur ilin la ĉielvolbo.

– Ho, mia Dio, kion mi faris? – balbutis Kristina.

Ŝi sentis tion, kvazaŭ la mondo estus pli malvasta kaj pli rapide turnus. Ŝi lace pendigas la manojn, kiel la agonianta birdo siajn flugilojn kaj iris al Bohuŝka apogante sin al tiu.

Eĉ ne Nikolao kapablas konsoli ŝin. Li iĝis apatia, sed lia koro iĝis pli fortiĝanta pro la ĝuste nun ricevita granda impulso de la neatendita okazintaĵo. Li sentis sin kiel tro streĉita

pendolo flirtanta en la senfina spaco. Tiu senfina spaco havis eksterordinarajn bildojn laŭ tio, kion oni vidis en okuloj de Kristina: bedaŭron, heziton, flegmon, senesperigon, malĝojon, aŭ amon.

Finfine Bohuŝka rekonsciiĝis kaj vigle diris:

– Nu, miaj gekaruloj, nun ni iru jam ien! La promeno estos bona. Etendu vian brakon, Nikolao, al mi.

Nikolao estis saĝa kaj sian brakon etendis ne al Bohuŝka, sed al Kristina. Kristina ektimis pro tio, kvazaŭ iu fremdulo vekus ŝin, la dormanton.

– Mia dio, mi ne komprenas vin. – diris Nikolao obtuzvoĉe kaj sian manon, kiun Kristina hezitis akcepti, metis sur sian frunton.

– Ĉu vi amas min?

– Ĉu mi diris ion? – diris Kristina kaj gapmirante rigardis Nikolaon kaj ŝiaj okuloj iĝis pli parolemaj.

– Ne volu tion, ke mi estu freneza. Ne malfermu la ĉielon antaŭ mi, ke mi blindiĝu kaj subite vi fermas tiun. Kial vi estas kruela pri mi?

– Nu, ja! Ne faru tion! – petoladis Bohuŝka. – la tuto estis nur ŝerco.

– Ĉu ŝerco? – diris amare Nikolao kaj ruĝiĝis – ja li unue diris: „Mi amas vin.”

Kaj poste ŝi diris: „Mi ne amas vin.”

– Ĉu tio estas ŝerco? Tiuj estas malgravaj vortoj, en kiuj vortoj oni povas havi venenon. Ĉu iun koron mortigi estas nur ŝerco?

Bohuŝka rigardis al la taŭzita mieno de sia frato kaj poste komencis plori. Ŝi ektimante trabrakumis la kolon de Kristina.

– Ĉu vi vidas, nun jam vere ne estas alia ...

Kristina demandante rigardis ŝin.

– ... Nur tio, ke vi amu ĉi tiun petolan knabon, ja vi vidas, ke li estas malĝoja.

Ŝi karesis dorlotante la mentonon de sia amikino, levis la kapon de Kristina kaj afable diris:

– Nu, amu lin! – ŝi diris malpacience – tuj amu lin! Nome li faros al si ian malbonon. Li estis ĉiam obstina.

Kristina obstinadis fiere.

– Ne povas esti! – ŝi diris. – Mi ne povas fari! Mi aliulon amas. Ĉi tio estas mia opinio.

– Ĉu vi amas aliulon? – kriis Nikolao surprizate, – tio estas neebla! – diru tion, ke vi nur ŝercas!

Nun malheliĝis. La vento de la proksimiĝanta tempesto movis la foliojn de la robinio. La vento iĝis ne tolerebla. La junulo volis foriri, sed post kelkaj paŝoj senforte falis surteren apud iun arbotrunkon kaj kovris sian palan vizaĝon.

– Ho, vi grandan doloron kaŭzis al mia koro, – li diris milde, riproĉe kaj singarde turnis sin for de Kristina, ĉar li ne volis kaŭzi doloron al Kristina, kiun li tre amas. Sed Kristina tamen ege suferis pro lia rigardo, pro tio ŝi paŝis al Nikolao ŝanceliĝante kaj siajn manojn metis sur lian kapon. – Nikolao, kia damaĝo trafis vin? Ĉu vi koleras je mi, ĉar mi estis sincera pri vi? Dio mia, ne forlasu min, amu min, Nikolao, kaj mi estu via edzino.

Nikolao subite eksaltis kaj fiere diris:

– Estu trankvila. Jam eĉ nun mi ne sopiras vin, sed mi ne forlasos vin. La amo estas senmorta, tiu ne pereas kiel piedtretita raŭpo, nur ŝanĝas figuron. Amu tiun, kiun vi volas ami, sed estu mia virino.

Poste li leviĝis for de la tero, liaj okuloj brilis. Kristina surprizate dorseniris unu paŝon de antaŭ li kaj diris afable, sed malĝoje:

– Jes, Nikolao, mi volas esti via edzino. Konsolu min per via amo, helpu min por toleri la vivon, ke...

Kristina provis rideti, sed forte ekploregis. Ŝi mordetis siajn lipojn. Nikolao ne estis kapabla rigardi ŝin. Li iĝis furioza kaj malĝentile ekkaptis la brakon de Kristina kaj minacante alparolis:

– Ne! Kristina! Neniām!... Ni ambaŭ mortos! Mi ne forlasos vin! Mi ne lasos bati vin. Vi mortos, se vi ne diros al mi, kiun vi amas. Lia voĉo iĝis fulmotondro.

Kristina denove provis rideti, per siaj malgrandaj blankaj dentoj ŝi mordetis siajn lipojn por haltigi siajn larmojn.

– Nikolao, mi amas neniun! Neniun! Neniun!

La eĥo diris reen de la monto „Sztitnya” du foje la vorton „neniun.” Nikolao forte premis la brakon de Kristina, kiu eksiblis pro la akra doloro. Li ne estis jam homo, sed ĵaluza sovaĝbesto. Li estis ia monstro, kiu ne kapablas pensi, sed liaj ekscitoj direktas lin.

– Tio ne veras, Kristina! Vi trompas min! Ni volas scii tion!

– Tio estas enorde. Mi amas nek vin, nek aliulon. Mi sonĝas pri tiu viro, kiu estas bela kiel don Alvira en la romano „Nigra virino” kaj estas bravulo kiel Athos en la romano „Tri korpgardistoj”. Tiu estu kapabla ami kiel Gaston en la romano „Sep orhareroj,” kaj estu saĝa kiel Ivano Berend en la romano „Nigraj diamantoj.”

– Ja vi estas frenezulineto! – ekridis Bohuška, – vi atentis tiujn ekzaltitajn poetojn, verkistojn.

– Ho, dio mia, mi mem ne scias, pri kiu mi dezirus sonĝi ... Nur tion mi sentas, ke tiu ne tute simulu al Nikolao. Ho, ve, mia kapo ege doloras. Nur iomete estu alia tiu viro, kia estas Nikolao, tiu tiuokaze mi vere amus lin, sed nun... Nikolao premis pli forte la brakon de Kristina, ol pli frue.

– ... Nun pro tio mi volas esti via edzino, ĉar vi estas bela knabo kaj oĉoj Csutkás kaj Luppán – po unu – petis min de mia patro, en la vitlaŭbo; mi estu kiel ilia estonta edzino.

Ŝi turnis sin ektimante al la ĝardeno.

Kaj vere, sur la piedvojo, sur kies flankoj kreskis riboarbustoj, tri sinjoroj paŝadis al ili.

Ĝentlemano Luppán atingis la junulojn kiel unua. Lia vizaĝo brilis pro miellanga afableco.

– Rigardu! – kriis li bonhumore – ja vi ploris, Kristina, kiu plorigis vin? Certe sinjoro Csutkás. Jes. Tiu estas certe tiu malbenita maljunega ulo. Ĉit! Tiu venas ĉi tien ... li kapablas ekaŭdi!

Sinjoro Luppán kaŝobservante rigardis malantaŭen.

– Jes! Tie estas tiu malbenita maljunega ulo, kiu estas ankaŭ ridinda. Jes, mi kuraĝas diri antaŭ ĉiuj.

Li konvinkiĝis, ke Csutkás ankoraŭ estas malproksime kaj mallaŭte daŭrigis:

– Mi ne dezirus, ke li ekaŭdus mian opinion. Nome li estas malsana pri galo kaj pro tio povas malsaniĝi. Vi, fraŭlino, bone faris, ke forkuris. Tio estis la plej bona faro koncerne la „maljunulon.” Tio estis tenera konfeso, kiun mi ekkomprenis.

– Ho, oĉjo Luppán, – interparolis Kristina ruze.

La virinoj kapablas samtempe plori, malami, koleri, ami, revii kaj rideti. Ili estas samtempe simplanimaj kaj artifikaj diplomatinoj.

Luppán konsterniĝis pro la alparolo „oĉjo.”

– Kristina, ne diru tiun vorton „oĉjo”. Plie diru: „kara mia.”

Nikolao maltrankvile senĉese moviĝis kaj se Bohuška ne trankviligintus lin, tiam li ofendintus la grafon pri minejo.

– Oĉjo Luppán ŝercas nun – diris Kristina – kaj per sia antaŭtuko kovris sian vizaĝon, ke Luppán ne vidu tion. Ŝi ridis afekte ridigante ŝian amikino, Bohuška-n.

– Ĉu denove? – diris Luppán plendante. – Ĉu mi aspektas tiel kiel kiu ŝercas? Ne, Kristina! Mi estas serioza viro, kaj mi meritas tion, ke oni amu min. Mi estas sperta homo kaj ne estas adoleskantaĉo, kiu kuras kontraŭ muron. Mi jam pripensante komencas la vivon.

Luppán faris paŭzon volante vidi la efikon de siaj vortoj sur la vizaĝo de Kristina, kaj li volis per aminda petoleco fortiregi la antaŭtukon de Kristina.

– Ne! Ne! – ŝrikis Kristina kaj kelkajn paŝojn ŝi kuris al Nikolao.

La maljuna amanto postkuregis ŝin kaj la kurantan anĝelon, kiu stumblis sur la korto estantan en trogo, li tenere ekkaptis ŝin ĉe ŝia talio.

Ho, kiome li iĝis ekscitita.

– Pri kio mi parolis? ... umo... umo... li balbutis konfuzate, ekscitite.

– Pri tio, ke vi estas sperta homo – diris Bohuŝka.

– Jes, mi diris, ke mi estas sperta homo, ĝuis la plezurojn de la geedza vivo, entombigis unu edzinon kaj havos alian edzinon.

Li kortuŝiĝis, li ne estis kapabla paroli kaj delasis la talion de Kristina lace pro la plezuro.

– Ne por entombigi, sed por feliĉigi mi volas tiun. Vin mi volas feliĉigi, Kristina! Vi estas inda por esti mia edzino.

La sekva momento sinjoro Csutkás paŝis al ili kaj lian dikan, stanopezan kaj harkovritan manon metis sur la ŝultron de Luppán, dirante:

– Homo, ne umadu kaj ne faru malĝustajn ŝercojn! Ĉu vi ne vidas, ke ŝi estas fremda por vi, kiel por mi la sanskrita litero?

– Tio estas litero fremda, tamen ĝi parolas. Tiun literon mi konas, Luppán. Ĝi pendas sur mi.

– Miaj amikoj! – interparolis Csemez serioze kaj la horloĝĉenon karesante. – La afero, pri kiu vi diskutadis, estas tikla privata afero. Pri tio ne estas inde multe paroladi. Nome tio povas plimallongigi la tempon por la kartludo. Sed notu bone, ke mia filino havas junajn gastojn, kiuj ne devus aŭskulti la samajn scenojn, paroladojn.

Sinjoro Csutkás jesis, sed Nikolao fiere, decidvoĉe alparolis: – Permesu min, kara oĉjo, ne protesti kontraŭ tiu sceno, ja mi volas partopreni tiun scenon. Nome ankaŭ mi amas Kristinan kaj ankaŭ mi petas ŝiajn manojn de vi.

Nun iĝis festa silento.

Csutkás viŝis per poŝtuko sian ŝvitantan frunton kaj murmuris: „Vi estas aŭdaca junulo!” Luppán rigardis al la ĉielo kaj plendadis al siaj geamantoj: „Ĉu vi vidas, kara mia edzino, kara mia Estera, kara mia Laĉjo, nun estas denove malfeliĉo!”

Nur sinjoro Csemez restis malvarme trankvila, li rigardis la junulon, suĉis el la flartabako kaj sentis iun eksterordinaran okazintaĵon, kiu vere okazis en la sekva minuto. Nome sinjoro Csutkás diris la sekvojn:

– Ha ha ha! La situacio komplikiĝas. Tio estas vera gordia nodo. Ĝis nun la situacio estis tikla, sed de nun estas pli komplika. Nu, mia fraĉjo, ĉio estas enorde. Ankaŭ vi volas geedziĝi. Vi pravas. Mi konas vian patron. Tiu estas brava honesta homo. Tiu estas mia bona amiko. Atendu iomete, kaj mi solvos tiun gordian nodon.

– Mia patro! – diris Kristina ekkaptante la manon de sia patro. – Mi devas diri al vi, ke...

– Ĉi! Vi devas diri nenion! Mi havas iun proponon kiel mian respondon al miaj amikoj. Ĉi tiu propono ne ŝanĝos efike vian proponon, ĉar tio estas firma kiel la monto de Ŝiono. La vera amo sama estas kiel la triprova oro.

Nome, Stefano Csemez estas vera viro.

Sinjoro Csutkás kaj ĝentlemano Luppán efike de tiuj vortoj turnis sin al la „vera viro” kaj amike skuis lian manon.

– Dankon, – li diris, – sed ĉi tie estas malbenita varmego. Kie estas la biero, Kristina? Portigu la kruĉojn en la ĉambron, ĉar, ĉar, ...

Li ne estis kapabla fini la frazon kaj trovi la logikan pravigon al la fino de la frazo.

– ... ĉar ankaŭ la kruĉoj estas tie kaj en tiuj la biero. Ankaŭ vi, Kristina, hastu, nome ankaŭ vi devas aŭdi mian direndon. Stefano Csemez ne sekretadas. Kion li diras, tio estas dirita. Li havas rajton diri strangaĵon, aŭ frenezaĵojn.

Post ĉi tiu scienca pritraktado li tromemfide ĉirkaŭrigardis kaj instigis la ĉeestantojn por iri en la vestiblon kaj de tie en lian laborĉambron.

Tiu estis simila al la ĉambro de iu sciencisto. Tie sur ĉiuj mebloj estis polvo, sur la planko, seĝoj, ŝrankoj kuŝis dise-mise la malnovaj libroj, laboratoriaj ujoj, balonoj, maŝinoj. Sur la muroj pendis bildoj de sciencistaj viroj, kiuj estis famaj orfarantoj. Sed iliaj sciencoj estis senvaloraj kaj, tiam se li volus plezurigi sin per iu vera „orfaranto”, tiam li metintus sur la muron bildon de Luka Zeelig, kiu estis juda uzuristo. Tiu kutimis krediti al la sinjoroj instruistoj pro „malaltaj” interezoj.

Ĝis la porto de la biero regis deprimado en la ĉambro, sed poste la biero ĉesigis ĝin. Sinjoro Csemez regalis sidlokon al la gastoj, sed petis ilin ne tuŝi la objektojn. Post kelkaj tusadoj li komencis diri sian proponon:

– Mi sentas, ke mi estas tre ege estimata. Ankaŭ Kristina estas nun tre estimata. Sed tio estas la pravo, ke mi havas principojn. Mi ne donas mian filinon, nome mi kroĉiĝas al ŝi. Ŝi estas bela, kara kaj pro tio mi volas havi ŝin apud mi. Ŝi estu bela apud mi. Se ŝi ne estus bela, mi ne volus restigi ŝin. Mi meritas, ke mi havu ŝin. La maljuna Csemez estas obstina kaj neniu kapablas ŝanĝi mian volon. Ni nur al tiu donas mian filinon... Li faris longan paŭzon kaj fermis la okulojn, sed levis la kapon.

– Nur al tiu, ...

Li denove faris paŭzon, kunpremante siajn mankojn kaj la brakojn etendis.

– ... kiu portas al mi tioman oron, kioman pezon Kristina havas.

Nun estiĝis granda silento, nur Bohuŝka ridetis.

– Precize mi petas tioman oron. Sed se tio estas malplimulte, tiam mi ne akceptos tion.

Sinjoro Luppán vigle interkriis:

– Tio estas revo, Stefano!

Sinjoro Csemez indignante rigardis la interkrianton:

– Mi parolis kiel serioza patro kaj ne kiel bona amiko. Donu al mi estimon! La ideo estas romaneska, sed ne freneza. Kion mi diris, tiom mi diris. Ni ne parolu pri tio plu. Mia filino, Kristina, donu al mi la kruĉon.

Efike de tiuj vortoj sinjoro Luppán prenis sian ĉapon kaj forirante diris ĉe la pordo:

– Adiaŭ, Stefano! Mi neniam kredintus ĉi tion. Ĉi tio estas la primoko de la malriĉeco. Estas enorde, Stefano!

Li frapfermis la pordon post sia foriro.

Nikolao pripensante sidis apud sia fratino. Csemez ĉesigis por li ĉiun esperon. Bohuŝka kuraĝigis lin, sed li havis iun aŭdacan planon.

Li trankvile ekstaris kaj paŝis al Csemez.

– Mi ekkomprenis vin – li diris – kaj mi promesas, ke mi portos tiun oron.

– Ah! – kriis Csemez surprizate – ĉu vi portos tion?

– Ne hodiaŭ, ne morgaŭ, Dio scias, kiam mi portos, sed iam mi portos tion, aŭ mi mortos.

En la okuloj de Kristina admirplena fajro ekflagris, ŝi iĝis ekscitita, entuziasmiĝis kaj entuziasme rigardis al la junulo.

– Ho, Nikolao, – flustris ŝi feliĉe – tio estas bela romaneska promeso. Tre ege amu min kaj ankaŭ mi tre amas vin.

Sinjoro Csutkás stulte rigardis la ĉeestantojn kaj estis malĝoja. Li etendadis siajn mankavojn, kvazaŭ li kalkulus ion. Fine li fermis la okulojn, siajn larĝajn mankavojn metis sur sian ventron, karesadis tiun kaj fingrumis la butonojn kvazaŭ li dirintus: „pastro ... soldato ... hundkaptisto ...” kaj mallaŭte balbutis:

– Nu, ne gravas: Ili pendas sur mi!

### **Kvara ĉapitro**

*Estas klarigita al la leganto la mirinda forto de la vorto „Tempo”.*

La studentoj arbaristo – kaj ministo – fakaj de Ŝelmec estas tre interesaj, spiritohavaj, malbanalaj fraŭloj. Ili ege ŝatas ĉikani la mondon, socion, instruistojn, kaj la menciitajn aferojn ili nomas: „tio estas egala al ni.” Tio, laŭvorte signas: „Ne tuŝu tion.”

La junularo de la Akademio estas unu eta ŝtato, kiel la socio de la germanaj ĉeflernejaj, universitataj studentoj. Tio estas karikaturado de la hodiaŭa societo. Tio havas multe da specialaĵoj. La korporacia spirito kreas fratecon, sed havas proprecojn. Se iun studenton oni kaptas pro krimo, tiam la aliaj studentoj kapablas oferi siajn vivojn, por liberigi tiun. Ili demonstracias antaŭ la juĝejo, fine la juĝistaro liberigas la akuziton, spite de tio, ke la akuzito estas kulpa. La juĝistaro kontraŭdiras al la justo, nome tiu ne kapablas kriegi, interbatadi kaj en Ŝelmecbánya ili ne havas influon. Se al iu studento la drinkejmastro ne kreditas, tiam tiu fakto estas milita kaŭzo. Kaj tiam li, la malfeliĉulo ne povas resti en la antikva urbo. Li povas enfermi sian drinkejon, sian ŝlosilon povas ĵeti en la puton. Nome se la „praktikantoj” diras: „foriru!”, tiam tiu homo estas neniigita. Tiu estas la ĉefo de la socio, kiu kapablas drinki la plej multe da bieroj kaj portas la titolon: „Bierreĝo!” Tiu havas preskaŭ senliman potencon, kiun regulas tiu konsilantaro, kiun kreis la drinkantoj de la plej multe da vinoj. La imposton pagantoj estas la unuajara studentoj kaj tiuj devas obei al la maljunaj studentoj. Se tiuj obeas, tiam ili lasas gastigi sin per la junaj studentoj. La kvarajara maljuna studento havas ege grandan prestiĝon, kiu povas fari ĉiun malbonon, ĉiun tiu povas bati senpune. Tiu ne okupiĝas pri Dio kaj ne estimas potencon de la homo. Tiu estimas nur unu vorton, kiu vorto estas: „TEMPO”.

Se la praktikanto pri minado de Ŝelmec skribus sur iun centan bankbileton la vorton „tempus” (tempo) kaj forĵetus ĝin sur la strato, tiam neniu forportus tiun, ĉar la vorto signifas: „Ne tuŝu, ne forportu!” Se iu forportus tiun, tiu havus malfeliĉon. Se la maljuna studento diras tion al la unujara studento, tiam ĝi signifas: „Mia unuajara studento ne estas batebla! Tiukaze la unuajara studento estos sankta kaj nedifektebla. Se sur la mantelo estas skribita la vorto „tempo”, tiam tiun neniu kuraĝas forporti, aŭ timante tion iu reen portas. Se sur tiu ne estas la vorto „tempo”, tiam kiu ajn povas ŝteli la bileton kaj la posedanto ne havas rajton iam ajn serĉi tiun, ĉar tiu estas nenies.

Sed ĉio ĉi estus longa kaj enuiga historio kaj ne tro apartenas al nia historio, sed mi devas klarigi: Kial estis ĉizite la vorto „tempo” sur tiu gefianĉiĝa ringo, kiun Nikolao tiris tuj la sekvan tagon sur la fingron de Kristina?

Nikolao posttagmeze iris al la renkontejo, kie Kristina sole estis. Ŝi estis pli pala, ol aliokaze, sed pro la hieraŭaj okazintaĵoj kaj la maldormita nokto, ŝia vizaĝo estis pli interesa, ol hieraŭ.

– Mi venis por adiaŭi, Kristina – li diris.

Kristina ĉesigis la akvumadon de la plantoj kaj gapis Nikolaon.

– Kien vi iras? – ŝi demandis.

– En Kalifornion, en San-Franciskon, aŭ kien ajn, kie oni fosas oron.

– Ne freneziĝu!



– Tion mi decidis hieraŭ. Tio estas jam fakto. Mi foriras, ĉar tre ege amas vin. Nur tio estas la demando, ke kiom da...

– Kiom da kilogramoj mi pezas? – ridis Kristina ridetante, sed la rideto estis altrudita.

– Jes, tion mi devas scii. – respondis Nikolao.

Poste li proksimiĝis al Kristina, prenis ŝian manon kaj diris:

– Nu, ne gravas. Unu-du kilogramoj ne estas gravaj.

– Mia pezo estas okdek unu funtoj. Mi mezuris min hieraŭ.

– Tio estas multe, sed tio ne gravas.

Poste li elprenis el sia veŝtopoŝo arĝentringon, sur kiun li gravuris la vorton „tempo” kaj tiris sur la fingron de Kristina.

– Ĉi tiu fingroringo estas la gefianĉiĝa ringo. Orringon mi ne kapablas doni, ĉar mi ne povas malŝpari la oron. Vi estas mia fianĉino de nun. Ĉu ne?

Kristina silente kapbalancis.

– Mi dankas al vi – li diris – jam mi estos forta kaj atingos la celon. Mi memoras tiun kison. Dio gardu vin, adiaŭ, dolĉa Kristina!

– Ne! Nikolao! Ĉu vi volas foriri nun? Atendu! Mi volas paroli kun mia patro, kiu devas ŝanĝi sian decidon. Vi ne povas foriri!

Sed Nikolao skuis la kapon.

– Mi konas vian patron, Kristina. Li estas ege obstina. Adiaŭ! Gardu vian amon al mi. La fingroringo gardos vin por mi.

Kristina nevolante ekkaptis la brakon de Nikolao kaj longtempe tenis tiun, sed sciis, ke tiu movo maldecas kaj pro tio ruĝiĝinte balbutis:

– Ho, faru tiel, kiel estas bone laŭ vi. Mi amos vin ĉiam kaj mi atendos vin ĝis eterno. Dio estos mia atestanto.

Nikolao larmiĝis, turnis sin de ŝi, sed subite kisis ŝiajn lipojn, poste li forkuregis kiel mensperdinto. Kristina kiel skulptaĵo ŝtoniĝinte, senmove postrigardis lin kaj sentis, ke ŝia voĉo malaperas kaj ŝia vivoforto malpliĝas rapide.

– Li foriris ... ŝi ekkriis laŭte.

Poste ŝi pleregante falegis sur seĝon.

– Dio mia! Mi nur nun sentas, kiom mi amas lin. Ja li similas al la herooj de la romanoj.

### **Fino de la historio**

Poste neniu vidis Nikolaon Mirkovsky en Ŝelmec. Li foriris senvorte. Li forlasis siajn gepatrojn kaj sian pli aĝan fratinon. Dum la sekvaj jaroj ne venis famoj pri li, neniu sciis, kie li estas, kien li iris por serĉi la oron. Neniu sciis: ĉu li vivas, aŭ jam mortis?

Finfine iu letero venis el San Francisko por Kristina, kies enhavo estis la sekva:

„Kara mia Kristina! Ni vivas. Mi havas deksep kilogramojn da oro kaj mi devas kolekti ankoraŭ sesdek kvar kilogramojn da oro. Tiu scio, ke mi havas vin, tio vivigas, feliĉigas. Vian respondon mi atendas en hotelo „Orfosantoj de San Francisko.”

Nikolao”

Kristina tuj respondis.

„Kara Nikolao! Ankoraŭ mi ĉiam atendas vin. Mia patro estas obstina, sed mi tamen faris ion. Nome mi manĝas malmulte, ke mi ne malsatmortu. Ho, dio mia, kiom estas bone malsati por vi. Imagu! Mi iĝis pli maldika, ol antaŭ unu jaro. Mia pezo estas nun sesdek sep kilogramoj. Pro tio vi pli facile kolektos la bezonatan oron. Mi esperas, ke vi sukcesos kolekti tiun oron.

Kristina”

Proksimume pasis dek jaroj, sed Kristina ne ricevis respondon. Dume la maljuna Csemez mortis kaj Kristina iĝis bela fraŭlino, sed ĉiuj sciis, kial ŝi ne edziniĝas. Nome ŝia fianĉo en iu malproksima lando fosas la oron, kaj ĉe ĉiu movo li suspiras por ŝi. Tiun suspiron iu popolkanto eternigis:

„Li fosas la oron.  
Hej, kial fosas li!  
Ja vizaĝ’de Ĉemez<sup>14</sup> Tini,<sup>15</sup>  
per ĉiu sablero perdas  
unu rozon.

Nur iu hejmenalvenanta vagabondo portis informon pri li. Tiu diris, ke li renkontiĝis kun Nikolao Mirkovsky antaŭ tri jaroj kaj tiam tiu havis kvindek kilogramojn da oro.

Ho, dio mia! Kiel oni povus mesaĝi al li, ja ne estas bezonata la oro, nur li venu hejmen. Csutkás kaj Luppán estis ĉiutagaj gastoj ĉe Kristina. Ili al kutimiĝis al la domo, kaj post la morto de la maljuna Csemez ili tie paroladis kaj flartabakis. Ili ne pensis je la amo kaj geedziĝo. Ja tio estintus superflua, nome sur la fingroringo de Kristina estis skribita „tempo.” Pro tio neniuj petis ŝin esti edzino. Kristina esperadante persiste atendis lin. La dubeco havas doloran kaj dolĉan poezion.

Kiam ŝi rimarkis la grincadon de la pordego kaj la bojadon de la hundo, tiam ŝi kredis, ke Nikolao hejmenvenis. Se la tondilo elfalis el ŝia mano, kaj ties pinto boris en la plankon, tiam ŝi pensis: certe gasto venos al la domo. Tiam ŝi pensis: certe Nikolao venis hejmen. Kiam sinjoro Csutkás suĉis el sia flartabako, tiam li diris:

– Tio ne estas neebla! Se mi ne estus maljuna, Kristina, mi irus por li kaj portus lin hejmen. Ĉu vi konsentas, Luppán?

Li suben klinis la kapon kaj larmiĝis.

– Sed mi ne povas iri, Kristina, ja mi ne povas forlasi miajn disĉiplinojn, ĉar ili pendas sur mi.




En Besztercebánya – Grafikaĵo, gazetdetalo, 1857  
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=44651>

<sup>14</sup> La familia nomoriginalo estas Csemez.

<sup>15</sup> La karesnomo de Kristina estas Tini.

## Tiu nigra makulo



Faro de tagmeza ripozo – Gravuraĵo, gazetdetalo, 1879  
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=53353>

La ŝafejo de Brezina<sup>16</sup> estas la plej fama ŝafejo. Ĝi havas kalkitajn murojn kaj ruĝan tegmenton. Ĝia pordego estas fortikita per plumbonajloj. Apud ĝi floras tulipoj kaj altaj jarcentaj arboj tenas ombron super ĝi. La arboj kovras tiun, por ke ne vidu ĝin ĉiu frenezulo. Nur la alta, svelta sed ne maldika kamentubo videblas fumanta ĉe la fino de la ŝafejo, kie pipfumas la ŝafmastro kaj loĝas kune kun siaj ŝafoj.

Nur kuraĝe diru la fumo de la kamentubo, ke la fama ŝafmastro, Tomaso Olej kuiras ĝuste nun ŝtelitan viandon en kaldrono, sed li ne malutilas al la kamentubo. Nome li estas la sola sinjoro de la maljunega montaro Matro, tio estas ĝis la valo Kopanyica (kopanjica)<sup>17</sup>. Revema ŝalmovoĉo aŭdiĝas en la malproksimaj regionoj:

„Al ŝafoj de Olej,  
arĝentas kolringo  
silkherbas la paŝtej’  
oras sonorilo.”

<sup>16</sup> Brezina estas slovakia setlejo.

<sup>17</sup> Post la ĉeso de la submetiĝa tempo por la turka regado, en la departamenton Nógrád, en la popoliĝantan terenon de Hungarujo, multaj slovakoj transloĝiĝis. Ili nomis la terenon agrikulturendan: bona por hojado, hoja tero: kopanyica, poste ĉi tiu regiona nomo restis. Mi donis ĉi informon laŭ mia scio – Adrienne Pásztor, la provlegantino.

Kiam la mil ŝafoj marŝas sur la rosa gazono, antaŭe iras la naŭ virŝafoj, la pli malgrandaj ŝafidoj saltadante, la ŝafinetoj reveme iras, la eksvirŝafoj marŝantaj kun serioza digno, se la tuta ŝafaro estas jene kune, kaj la hundo Merkuoj kuras ĉirkaŭ ili por ne lasi ilin disiĝi, sed restigi en cirklo, tiam la koro de Tomaso Olej sentas fieregan plezuron, kiel tiu reganto, kiu tenas militinspekton. Juna paŝtisto, portanta feltajn botojn, akompanas la ŝafaron de unu flanko, dum sur la alia flanko iras la ŝafmastro rigardante la ŝatatajn ŝafojn. Li konas ĉiujn laŭ ilia koloro, li konas eĉ ilian historion.

Tiu senkorna unu-du jara ŝafo vojeraris en la arbustejo kaj ne estis kapabla elveni de tie. Merkuoj ektrovis tiun. Merkuoj liberigis kaj retiris ĝin eĉ en duonmort-stato al la ŝafaro. Tiu estas saĝa hundo kaj meritas, ke ĝi ne naskiĝis kiel homo.

La piedo, de tiu rondkorna eksvirŝafo, kiu estas apud la ŝafineto, antaŭ tri jaroj estis rompita. Olaj splintis la piedon, kuracadis tiun, kaj la kvar piedoj iĝis samlongaj.

Tiu sendenta maljunega patrin-ŝafo, kiu nun skrapas la sekan herbaron, serĉante sub ĝi la freŝan herbon, iam estis kanajla besto. Dum malvarma nokto ĝi naskis idon kaj pli frue, ol kutime, dum malvarmega nokto. Kiam la ŝafmastro noktomeze enrigardis en la ŝafejon, tiam la novnaskita ŝafido ĝisduone estis frostiĝinta kaj la patrinŝafo same estis malsana, pro kio ŝi ne povis varmigi la idon. La patrinŝafo estis agonianta. Olej portis la ŝafidon en la ĉambron de la domo, kiel provon li kuŝigis ĝin en la liton de Anika inter la varmajn kusenojn. Tie dormis la infano kaj la ŝafido nenion sciante unu pri alia. Matene Anika ridetis ekvidante la ŝafidon, kiu skuadis sian vosteton. La infano kaj la ŝafido ĝojis, sed ili ne havis patrinojn.

Ankaŭ la patrino de Anika forpasis post la nasko de sia filino. Dio forportis la edzinon de Olej kaj donis al li la infanon. Olej unue estis malgaja, sed poste trankviliĝis, ĉar la ŝafmastro de Brezina konas la decon.

Dio volis tion. Lia plej potenca mastro estas Dio, kiun ne eblas provoki, kiu tiel batas la homojn, kiel volas. Tiu bato doloras, sed oni devas toleri tion.

Li estimas kiel mastron la princon de Talár, por kiu li devas doni prirespondadon pri la ŝafaro, ja la princo havas la tutan ŝafejon kaj la ŝafaron. Tiu estis homo grandan potencon havanta, por kiu oni sonorilos post la morto kaj kiun oni estimas dum lia tuta vivo. Tomaso servas tiun fidele. Nome malsaĝa homo estas tiu, kiu tranĉadas tiun arbon, sub kies ombron li kutimis iri por refreŝiĝi. La aliaj ne ordonas al la ŝafmastro de Brezina. Li estas memstara, neniun batas, neniun batas lin. Tiu fakto, ke ŝtelita ŝafido estas en la kaldrono, ne estas malbono. Tio apartenas al la ŝafistvirto. Nome ĉiu scias krom la departementaj sinjoroj, kio estas la ŝafistvirto.

Multfoje li diskutadas kun tiu sia tria mastro, kiu nur kondutas kvazaŭ li estus sinjoro. Nu, tio ne estas malbono, nome Olej ĉiam havas iun ŝafidon kiel donindan donacon al la elektita juĝisto de la departemento kaj efike de ĝia ŝafidblekado mutiĝas la jurisdikcio.

Olej ne estas sentema homo. De kiu li ellernintus la sentemecon? Liaj amikoj estis nur la ŝafoj kaj ne la homoj. Tiuj estas toleremaj kaj ne sentemaj. Tiuj estas kontentaj pri ĉio.

Sed li havis iun instinkton, kion Dio donis al li por pensi pri si mem. Anika-n li apenaŭ ŝatis pli forte, ol la ŝatatan ŝafideton, sed se Dio donis ŝin, tiam li ne volis forĵeti ŝin al la lupoj, sed li dungis iun vartistinon por eduki ŝin. Nun jam ŝi estas plenkreskulino. Ŝi kuiras kuminsupon kaj la ŝafidperkelton. Ŝi kudras vestaĵojn de li kaj lia juna ŝafisto.

Ŝi ĉion kapablis fari, kiel ŝia panjo. Tomaso bedaŭris la panjon de Anika, kiu estis bona homo. Ŝi ripozu en paco. Tiu meritis la lastan honoron. Trioble oni sonorigis por tiu kaj diris adiaŭigajn versojn. La vilaĝanoj diris al li dum la entombigo riproĉante, ke li estas „sovaĝbesto de la arbaro”, ja li ne ploris dum la entombigo, ne priploris sian edzinon.

Olej ne konis la kutimojn de la vilaĝo. Li ne volis plori. Li ne sciis, ke tion dezirus la deco. La arboj de Brezina ne instruis lin mensogi.

Boriŝ mortis, jam ŝi ne revenos. Lia koro kunpremiĝis. Li mute akompanis ŝin senĉape al la loko de la eterna trankvilo. Post la entombigo li pagis la koston de la entombigo al la pastro kaj al la kantoro, poste li metis surkapen la ĉapon kaj iris en la ŝafejon.

Pri kio li povis pensadi dumvoje? La malnova vojo estis ege konata, sed li ne rekonis ĝin. Li kredis, ke tio estas fremda loko. Kie estas la domo de Brezina? Sed ĉio estis senŝanĝa: la montoj, la kampo, la rivereto, la puto, la trogo. Sed io mankas. La domo kaj ĝia ĉirkaŭo estas malplena, senpopola. Anstataŭ la feina Brezina nun ekzistas iu pli malgaja Brezina. Kial? Li ne sciis.

Ankaŭ nun post dek ses jaroj, kiam li aŭskultas revemajn kantojn de Anika, dum li sidas sur la montoflanko apud la grego, tiam li aŭdas iun sekretan voĉon:

„Tomaso!”

Tiu voĉo venas el la arbaro, la arboj, arbustoj tremetas pro tio kaj silento estiĝas super Brezina. La ŝafmastro emociiĝas, forte atentigas la voĉon kaj esperadas por aŭdi la vorton „Tomaso”, kio dolĉe aŭdiĝis de belaj ruĝaj lipoj. Sed tiujn lipojn la vermoj polvigis.

La eĥo de Brezina ĉiam aŭdiĝis dum dek ses jaroj, la arbaroj pludonis ĝin, al la valoj, al la riveretoj kaj atingis la orelojn de Olej kaj lia koro kunpremiĝis.

– Ĉu tio estus ĝi, aŭ ĉu alia? Ĉu la ombro de la mortinta edzino vokas lin? Ĉu tiu voĉo viviĝis kaj nun alparolas lin?

La ŝafmastro subite eksaltas, levas la kapon. La flava kombilo elfalas el lia longa hararo kaj ĝi falas sur la ŝultrojn. Li ĉirkaŭrigardas sur la pejzaĝo kaj li ekhavas multe da pensoj, ja kvardek jarojn li paroladis kun arbaro, roko kaj nuboj. Li certas, ke ĉi tio estis ŝia voĉo.

Ĉu povas esti, ke li nur sonĝis, ke Boriŝ mortis? Ja ŝi diris lian nomon „Tomaso.” La ŝafmastro minacante levas siajn pugnoj. Kiu kuraĝis diri tiun nomon? Poste li furioze disrigardas, sed li vidas neniun kaj aŭdas nenion. La ŝafoj mute paŝtiĝas. La virŝafo rigardas lin fikse, la juna paŝtisto dormas sur la gazono, folioj de la arboj ne movas kaj la birdoj silentas. Kiu kuraĝis imiti tiun voĉon? Kiu alparolis Tomason? Kiu scias? Povas esti, ke la muteco, kiun ĉesigas nur la zumadoj de la abeloj. Pri kio zumas la abeloj en la valo de Brezina? Ĉu ili scias, ke la ombro de la mortinta edzino iradas inter la arboj, ŝia dolĉa voĉo endesejniĝis en lian koron kaj nun ĝi ricevis flugilojn? Ĉu scias iuj ke la mortintoj longtempon vagadas inter la arboj ankaŭ post kiam ili jam polviĝis? Kun morniĝantaj okuloj li ĉirkaŭrigardas, sed li vidas neniun...

La ŝafmastro denove sidiĝas surteren apogante sin sur kubuton kaj pensadas plu. Li havas strangajn pensojn. Kiu pensadas pri arbaroj, rokoj, riveretoj, nuboj, tiu havas ĉiam pensojn.

Tiu granda enigmo, kiun havas la naturo, pensigas ankaŭ sovaĝan animon, paroligas tiun kaj la naturo respondas al tiu.

Neniu kredu, ke Olej ne pensadas! Li pensadas, tamen ne havas penson. Nome la pensoj disfluas kiel fandita plumb. Tio estas kaoso, kiu ne havas figuron. Tio estas ia nokto, en kiu estas lumo, kiu lumo estas praa poezio.

Olej pri ĉio pensadas, sed la pensojn li diras al neni. La pensado estas lia amuzo. Tio estas bona amuzo. Sed tio kelkfoje estas malgaja.

Multfoje li memoras sian edzinon, la efemerecon kaj tion, kiam ankaŭ li estos mortinto kaj oni vokos lin en tombejon. Tiam li ne vidas la regionon Brezina, la ŝafejon, la virŝafojn, la eksvirŝafojn, kiuj estas la plej belaj bestoj. La Suno same brilas, la arbaro same estos enigma, la herbo same kreskos printempe, la akvo de la rivereto same frostos kaj degelos kaj same novaj ŝafidoj naskiĝos. Nur li ne estos ĉi tie.

Se ĉe ĉi tiuj pensoj aŭdeblas la kantoj de Anika en la valo, tiam li tamen ĝojas, ĉar li havas idon, kiu daŭrigos lian vivon.

– Bedaŭrinde estas, ke lia edzino ne naskis filon.

Li suspiris kaj sovaĝe ĵetis sian nodbastonon inter la ŝafojn, pro kio tiuj diskuris. Li volis atingi tion, ke ankaŭ la ŝafoj sentu la koleron de la ŝafmastro.

Dume, ĉe la ŝafejo denove aŭdeblis novaj popolaj melankoliaj kantoj:

„Venas jam Garibaldi en la vilaĝon,  
Li kunportas Klapka-n, Gracza-n kaj Záhony<sup>18</sup>-on,  
Georgeto Bíró jungas la ĉevalon.”

Antaŭ Olej reviviĝis la malnovaj memoroj pri la bruoj de la milito. Kiam Gracza kaj Záhony faris elkuregojn de Brezina. Heroaj patrujdefendantoj estis ambaŭ, kvankam ili estis murditaj embuske, tamen la bona tót-a<sup>19</sup> (slovaka) popolo reatendas ilin, siajn bonajn samvilaĝanojn eĉ nun. Kiu portis la memorojn de la bataloj? La aero. La memoroj estas ĉi tie. Anika kantas pri tiuj. La birdoj aŭskultas tiujn kantojn. Morgaŭ jam ankaŭ la turdo ĉirpos.

Olej ne partoprenis la militon, li ne povis iri batali, sed tion rekonas, ke pli frue estis bona vivo, ja ankaŭ tio estis bela afero, kiam du fraŭloj luktis, ĉefe se du landoj batalis unu kontraŭ alia.

Sed ekzistis la ŝafaro, kies vokanta kolsonorilo restigis lin. Olej longtempe meditis pri ĉi tio kaj dume alvenis la vespero. La ŝafaro komencas ripozi. La ŝafoj estas dense unu apud alia, kio signifas, ke ili satiĝis kaj nun volas remaĉi.

La junpaŝtisto nun vespere kuraĝas alparoli la ŝafmastron.

– Ĉu vi ne aŭdas, mia sinjora mastro, ke oni sonorigas en Talár?

– Mi aŭdas. Ne babilaĉu! Prefere serĉu mian nodbastonon. Mi ĵetis tiun inter la ŝafojn.

Olej rigardis la ŝafojn, nome li estis scivola, ĉu iu ne mankas, aŭ iu ne estas malsana? Li certe kapablus rimarki, se el inter la naŭcentnaŭdek naŭ ŝafoj mankus unu besto.

Li konstatis, ke estas neniu malbono. Li metis sur sin la ŝafistpelton kaj li kaj la junpaŝtisto peletas la ŝafaron al la valo.

La kolsonoriloj de la naŭ virŝafoj kaj la trumpeto de la junpaŝtisto aŭdiĝas akorde. Tiujn Anika jam aŭdas kaj scias, ke la ŝafaro jam venis hejmen. Tiam ŝi komencis fari la vespermanĝon. Tiu iĝis preta, kiam ili atingis la hejmon. La junpaŝtisto atinganta hejmen metas la fluton sur sian dorson kaj rigardas al la hejmo serĉante iun figuron, kiun li ĉiutage vidas.

Anika jam atendas ilin antaŭ la domo, kio ege plaĉas al Matjo<sup>20</sup>. Kial ŝi estas ekstere? Povas esti, ke ŝi enuas, aŭ volas vidi la ŝafaron. Kiu scias tion?

Ŝi estas belega vivulino havante sveltan staturon, ŝiaj revaj okuloj rigardis la pejzaĝon. Ŝiaj etaj manoj pendas kaj volas kuri al la konata maljuna ŝafo, kiu dormis en ŝia lito. Povas esti, ke ĝi memoras ŝian salan manon. Pro tio ĝi lekadas ŝian manon. Ĉu ĝi memoras, ke iam ili dormis en sama lito? Kiu povas koni la filozofion de ŝafo?

– Bonan vesperon, Anika! – salutas Matjo la knabinon. – Kiel vi amuziĝis hodiaŭ?

– Hodiaŭ pli bone, ol hieraŭ – ŝi respondis ridetante – ĉu vi laŭdas la hodiaŭan tagon?

– Al ni estas bone, mia malgranda hirundo – diris la ŝafmastro demetante la botojn – ĉu estas preta la vespermanĝo?

– Jes, la perkelto jam odoriĝas, mia dolĉa patro.

Efike de tio la ŝafmastro ĝojis aŭdante la vorton „perkelton”.

– Iru, Matjo, miksu la perkelton en la kaserolo. Nome la perkelto tiam estas bongusta, se mano de ŝafisto helpas fari tion.

<sup>18</sup> La nomo Záhony eldirendas zahonj.

<sup>19</sup> Laŭ mia scio, la nacionomo Tót devenas de la 19. jc-a malbona slovaka elparolo de iu germana vorto, pro kio, laŭ la vortofinaĵo tót, oni komencis nomi la slovakojn: tót-oj. Ekz: drótoštót estis dratiga tót-o, nome dratigojn faranta slovako – noto de la provlegantino.

<sup>20</sup> Mátyás, Matiaso estis la hungara nomoriginalo de la vira karesnomo Matyi (matji), Matjo.



– Sed mia sinjoro mastro, mi ne konas la metion de la kuiristo kaj ankaŭ ne scias, kie estas la forno.

– Ne saĝumu, bubo! Ĉu vi kaj Anika ne fandis plumbon nomtage de sankta Andreo, kaj en la plumbo via vizaĝo videblis kiel edzo de mia filino?

– Ne tute – diris Matjo ruĝiĝinte – tiu estis ia plumbofiguro surŝultre kun fluto.

– Tio estis ne fluto, sed... – kontraŭis Anika.

– Kio estis? – stentoris Matjo.

– Estis pafilo. – diris Anika.

Kvazaŭ iu pikintus tranĉilon en la koron de Matjo. Kial ŝi nomas la fluton pafilo. Li sentis ioman malgajecon. Matjo rapidis al la pordo de la ŝafejo por fermi ĝin post la eniranta ŝafaro.

Olej denove pensis pri la perkelto.

– Ĉu la vespermanĝo estos perkelto? Tio estas brava afero. La homo tion kredas, ke ni havos gaston.

– Tiu tuj estos ĉi tie.

– Kiu?

– Tiu estas stranga homo. – respondis Anika.

– Ĉu tiu estas mia kunulo?

– Ne. Tiu estas iu ĉasisto. Mi lin vidis neniam antaŭe.

– Tiu certe ne estas ĉasisto, mia filineto, sed iu oficisto de la departemento, iu nenifaranto. Tiuj oficistoj ĉiam ĝenas la homon.

– Tiu ne estas sinjoro, ja estas tre ege juna. Lia vizaĝo estas tute blanka, kiu ne sunbaniĝis.

– Ĉu tiu havas pafilon? – demandis la ŝafmastro.

– Tiu havas belegan pafilon.

Matjo nun jam tute tiris suben sian ĉapelon sur siajn okulojn, apogis sin al la piramidforma poploarbo, ĉar li havis teruran penson. Li preskaŭ kapturniĝis.

– Tiu estas certe kuraĝa bubo, – murmuris Tomaso Olej, – ĉar li kuraĝas veni en la arbaron de la princo. Se tiu ne estus gasto, tiam mi forprenus ties pafilon.

– Tempe de la posttagmeza manĝado tiu venis ĉi tien – diris Anika. – Mi ege ektimis. Tiu petis lakton kaj donis ormonon.

– Kial vi akceptis la monon? – indignis Olej.

– Mi ne volis akcepti dirante, ke ni ne donas la lakton por mono, ja ni havas multe da lakto. Sed tiu forĝesis forporti la monon.

– Mi redonos tion al tiu. Kion pensus la mondo, ke ni donas la lakton al la vagantoj senpage?

Olej prenis la monon kaj gapante kriis:

– Ne estu mia nomo Olej, se ĉi tiu mono ne estas ormonero havanta kronon! Laŭ mi tiu estis Gracza, aŭ Záhony. Ĉe ili mi vidis la saman ormoneron. Matjo, ĉe ni estos festo. Ne estu malĝoja, bubo, prefere ni devas buĉi ŝafidon. Kuru rapide por porti vinon. Mi scias, ke Gracza, aŭ Záhony venas ĉi tien al la ŝafmastro de Brezina.

Anika ridetante skuis la kapon. Sed Olej treege entuziasmiĝis. – Tiu venas al bona hejmo, nome esti hejme. Mi gardos tiun kontraŭ la ĝendarmoj. Neniu kapablas forpreni ties pafilon, ĉar ankaŭ la muroj havas orelojn. (Iu povas subaŭskulti.)

Anika ankaŭ nun skuis la kapon.

– Ankaŭ nun mi diras al vi, mia patro, ke tiu estas junulo, kiu babilaĉis multon pri diversaĵoj.

– Vi ne estas kapabla konstati tion.

– Tiu diris, ke mi estas kampa floro kaj idolo de lia koro.

– Záhony estas sama donuano, kiam li vidas virinon.

– Sed Záhony estas pli aĝa homo.

– Sed Záhony estas iluziisto, kiu laŭplaĉe ŝanĝas la vizaĝon. Hodiaŭ li estas barba kadukulo, sed morgaŭ estos bubo. Pro tio mi rekonas tiun.

– Sed tiu diris tion, ke li vin ne konas.

– Nu ja, kiel li ne dirintus, ja diri eblas ĉion.

Anika tamen ne kredis, ke la maljuna Záhony povus esti tiu junulo.

– Tiu diris ankaŭ, ke mi estas feino kaj volis kisi min.

Matjo nevolante levis siajn pugnojn.

– Ĉu? – Matjo stentoris.

– Tiu eksidis apud min sur la sojlon de la vestiblo kaj petis trabrakumi mian talion, ĉar li freneziĝus, se mi ne lasas.

– Ĉu vi lasis tion? – demandis Matjo kolere.

– Sed tiu diris tiom ame kaj mi ne volis freneziĝi.

– Tiu similas al Záhony. – ridis ĝoje Olej.

– Kiam li volis kisi min, tiam mi vangofrapis per mia mano malpura pro la sarkado. Ĝia spuro videblis sur lia vizaĝo.

– Ho! – ridis la ŝafmastro – ĉu tiu ne iĝis kolera?

– Tiu petis, ke ankaŭ la alian duon-vizaĝon mi batu. Tiu diris, ke la vangofrapo estis agrabla kaj li ne lavos sin por ne forviŝi ties spuron. Afable adiaŭis li petante, ke mi faru bonan vespermanĝon, ĉar irinte hejmen li vizitos nin. Sed jam tiu venas tie!

Olej kaj Matjo rigardis al la montrita direkto. Sur la montoflanko svelta ĉasisto paŝadis portante grizan kamizolon kaj botojn kaj havis ĉasekipaĵon. – Bonan vesperon, ŝafisto! – tiu diris ne levante la ĉapelon, kiam li paŝis en la korton.

– Bonvenon – diris Olej deprimate, ĉar ne Záhony estis la gasto kaj li ĉagreniĝis, ke la gasto ne diris ŝafistmastron. Nome li ne estis ŝafisto. Sed li devis toleri la ofendon de la gasto.

– La vespermanĝo estas preta, ni atendis vin – diris Anika kaj kuris en la ĉambron.

La ŝafmastro paŝis al la gasto kaj etendis sian manon.

– Ni iru enen.

La ĉambro estis bela kaj pura, kie estis tri tulipaj kestoj, kelkaj benkoj, unu seĝo kaj unu tablo. Sur la tablo estis bela tablotuko. Sur la muro estis la portretoj de sankta Vendel kaj liaj helpantoj. Sur la muro pendis kruĉoj kaj drink-boteletoj. Sur la tablo estis unu kaserolo, en kiu estis la ŝafidperkelto havanta agrablan odoron.

– Bonvolu komenci manĝi – instigis tiun la ŝafmastro – kvazaŭ vi estus hejme. Tio sufiĉos por ni tri.

– Sed nun estas kvar personoj.

– La knabino ne gravas, por ŝi sufiĉas kelkaj manĝaĵpecoj.

La ĉasisto avide komencis manĝi kaj konstante laŭdis la perkelton.

– Saman bongustan manĝaĵon mi ne manĝis.

– Saman perkelton oni kuiras eĉ ne ĉe la princo Talár. Plej bona estas nur la perkelto de la ŝafmastro de Brezina.

La gasto ridetis.

– Tio estus bona, se ĉiutage mi povus manĝi tiun.

La ŝafmastro devis diri pro la konveneco:

– Tio estas bona, ankaŭ morgaŭ estos perkelto.

– Mi dankas al ci, ankaŭ morgaŭ mi venos.

La ŝafmastro mordis siajn lipojn. Tio estas jam ne tolerebla. Tiu bubo ciumas, ja lin ankaŭ la sinjoroj viumas. Hej, se tiu ne estus gasto!

– Vi ne iros hejmen, ja sur bona loko por vi estas ĉi tie. Anika faros liton en la ĉambro. Kien vi povus iri dum la malhela nokto?



– Mi petigis mian kaleŝon al la ŝafejo.  
 – Ĉu la sinjoreto loĝas ne malproksime?  
 – Ĉi tie mi loĝas en la proksimo.  
 – La koĉero malfacile trovos ĉi tiun lokon.  
 – Ho, ne! Mi diris al tiu, ke li venu al ŝafejo de Olej. Via nomo estas Olej, ĉu ne?  
 – Mi estas Tomaso Olej, la ŝafmastro, eĉ la sinjoro de Brezina. – diris li flegme kaj maltolereme.

La gasto ridis.

– Se vi estas mastro kaj sinjoro de Brezina, tiuokaze kio estas la mia?

La ŝafmastro ofendiĝinte fikse rigardis la gaston kaj orgojle demandis: – Kio estas via nomo kaj familia stato, nome laŭ tiuj ni, simplaj homoj kutimas estimi unu la alian?

– Mi estas Paŭlo Taláry, la princo de Talár.

Olej ege surpriziĝis, eksaltis kaj paliĝis. Ja li povis gastigi la junan princon, kiu estas preskaŭ same alta sinjoro kiel la reĝo. Li ne kredus tion.

– Ho, mia ekscelenca sinjoro, mi ne povis scii, ke vi estas la juna princo.

– Ne gravas, oĉjo! – diris la princo gaje – kvankam vi ne estas posedanto de Brezina, vi havas la plej valoran trezoron, la belan Anika-n.

Matĵo same sidis ĉe la tablo, kiu aŭdis tiujn vortojn, pro tio frostis la sango en liaj angioj, li povis nek movi, nek alparoli.

– La knabino ne estas trezoro, mia sinjoro ekscelenca, ŝi estas kosto. Ĝuste nun paŝis Anika en la ĉambron, ŝi metis sur la tablon vinon en kruĉo. Ŝi petole verŝis vinon en glason de la gasto, kaj ŝi diris:

– Poste gardu vin, nome pro la vino vi estiĝos embarasita.

– Mi jam embarasiĝis de vi.

– Jam ankaŭ pli frue vi estis embarasita, ŝi respondis naive rigardante lin.

De ĉi tiu diro, la koro de la princo pli rapide komencis ekbategi.

– Ho, malfeliĉa knabino, kion vi kuraĝas diri? – demandis Olej.

– Nu, ja, – respondis Anika rapide – tiu ne estas vicĵupano. Ni ekkonis unu la alian. Se li koleras, poste li baldaŭ paciĝas.

La princo neniam sentis similan plezuron, aŭdante ŝiajn pripaŭtantajn vortojn. Tiu elokventeco plaĉis al li. Li aŭskultus ŝin tra multaj jaroj.

– Ĉit! Knabino! Li estas la juna princo kaj nia mastro. Ne ofendu lin.

Anika komencis ridi. Ŝia rido similis al ia feinsonorilo.

– Nu, ja! Oni ne povas trompi min. Mi ne kredas tion, ja la nuna princo neniam venas al Brezina, aŭ al Talár. Ja tiu loĝas en Vieno en orpalaco, cent ĉasistoj portas al tiu la arbarajn sovaĝbestojn por fari vespermanĝon el ili. Tiu ne vagadas en Brezina por ĉasi. Tiu ne bezonas la perkelton de la familio de Olej, ja tiu manĝas eksterordinarajn manĝaĵojn. Tiu similas al la aliaj homoj.

– Pardonu ŝin, ja ŝi estas kulpanta infano, mia sinjoro ekscelenca!

Sed la ekscelenca sinjoro ne ofendiĝis kaj ili kune ridis. Sed Anika kredis, ke la princo priridas ŝin kaj ŝi komencis koleri kaj forirante murmuris:

– Ne pensu, ke vi kapablas frenezigi min!

Sed kiam ŝi estis ekstere, tiam ŝi komencis pensi, dirante, ke tiu estas tamen iu princo. Povas esti, ke tiu venis el Vieno. Iŝtok Lapaj rakontis al ŝi, kiu estis kamp-gardisto, ke iam iu maljuna princo estis la mastro de Brezina kaj nun post la morto de la maljunulo la junulo heredis la latifundon. Ja tio estas ne ebla! Dio mia! Kiom estas bedaŭrinde, ke tiu estas princo, ja povus esti bonstata kamparan-fraŭlo.

Ŝi tre malĝoje grimpis supren sur la eskalo al la subtegmento de la ŝafejo por rigardi la krepuskantan pejzaĝon.

Ŝia koro kunpremiĝis. Tiu estas vere princo. Sur la fortikaĵkastelo, kies ladotegmento videblas, flirtas la flago. Lapaj diris, ke tiu flago signas la ĉeeston de la princo.

Ho, ve! Sankta Dio! Ŝi vangofrapis la princan sinjoron. Ŝi priridis kaj ofendis la princon. Povas esti, ke oni senkapigos ŝin. Ŝi kun angora koro venis malsupren sur la eskalo, pensadante, kien ŝi kaŝu sin pro la honto de antaŭ la princo. Ĝuste tiam iu brila kaleŝo alvenis al la domo, kiam Anika atingis la subon de la eskalo. La princo jam staris en la korto. Ŝi preĝis, ke la princo ne rimarku.

Sed la princo rimarkis ŝin, li saltis al la eskalo kaj levis ŝin kiel lanugon kaj metis surteren. Anika nenion sentis, nome estis fascinita inter la dormo kaj la veka stato, sed tre agrabla.

– Ĉu nun jam ci kredas, ke mi estas la princo?

Poste la kavalirstatura princo ridante saltis en la kaleŝon, mansignis adiaŭon al la maljuna Olej, kaj al Anika diris mallaŭte flatlogavoĉe:

– Sed mi neniam estu princo antaŭ ci! Sed ci ĉiam estos por mi princino!

La kaleŝo haste foriris, sed la adiaŭantaj vortoj ĉi tie restas. Ili estas admirindaj vortoj. Ili estas teksitaj el fajranta fajro, ili sendas flamlangojn rekte al la koro. Nun la koro estas diranta sonojn de la danĝeron sciigantaj sonorilvoĉoj, kiel la flankenbatita sonorilo. Ili tiel bruligas la koron, ke ĝi fortege batadas, kvazaŭ ĉi vortoj volus kaŭzi pereon. Nokte la malhelo krias, tage la arbofolioj susuras daŭre, poste de unu vespero ĝis la alia ripetiĝas ĉio. Ili aŭdeblas jam preskaŭ ĉiu vespere, matene, ŝi aŭdas ilin el la klakanta fajra fajrujo, el ĉio: „Ci estos por mi princino ĉiam, ... ĉiam, ... ĉiam.” Anika volonte aŭskultas tiujn vortojn, pri kiuj ĉio parolas. Ŝi tuttage estis distriĝema kaj ne parolema. Ŝiajn kantojn neniu aŭdas. Nek Olej, nek Matjo. La fluto de Matjo estas muta. Hodiaŭ regas pli vera poezio, ol hieraŭ.

La knabino pensas, kial estas princo en la mondo, kiam la turto ne povas diri al siaj vivkunuloj: „Mi estas pli bela, ol vi.” Sed tio estas ege bela. Nome ĉiuj turtoj estas samaj.

La junŝafisto pensas: Kial iĝis lia fluto subite pafilo nomtage de sankta Andreo?

Post la malĝoja demando sekvis la malĝoja respondo. Vespere, kiam la ŝafmastro kaj Matjo hejmenalvenis, denove ĉeestis en Brezina la juna princo.

Tiu ĉasis tie kaj ĉiam iris al Anika por peti glason da lakto. Tiu povas ege ŝati la lakton kaj la sovaĝbeston.

Dum la tria tago la maljuna Olej jam kuntiris siajn brovojn kaj diris al la junpaŝtisto:

– Morgaŭ vi gardos la ŝafaron. La princo multfoje ĉasadas ĉi tie. Mi volas paroli kun tiu.

Anika ekstremis kaj vespere eblis ŝin demandi pri nenio.

Olej sekvatage ne akompanis la ŝafaron. Dum dudek jaroj tio ne okazis. La ŝafoj gapis pro tio, ili ne komprenis, kie estas ilia gardisto. Ili ne vidis la nodbastonon kaj ne aŭdis liajn komandvortojn. Ili hodiaŭ ne havos bonan apetiton, sed ankaŭ Olej enuas sen la ŝafaro. Poste posttagmeze li sendis Anika-n kun mesaĝo al Istok Lapaj. Li sciis, ke ŝi povos hejmenveni nur malfru-vespere. Poste li metis bonspecan tabakon en la pipon, por kiu ankaŭ la reĝoj kapablas interkvereli. Olej ekfumis kaj kuŝis sur la gazono surdorse kaj rigardis la ŝafejon, ties belajn blankajn murojn, la trabojn. Li laŭdis la farinton de la ŝafejo.

Dum la rigardado li rimarkis sur la muro iun moviĝantan ombron kaj malantaŭen rigardante ekvidis princon Paŭlo. Ĝuste lin atendis Olej. La princo iris al la pordo de la vestiblo. Li volis eniri tien, sed la pordo estis fermita. Li iris al la fenestro por frapadi.

– Malfermu la pordon, Anika! Ĉu vi dormas, mia ŝafido?

Sed la princo vane frapis, la ŝafido ne lasis eniri. Sed Olej malĝentile respondis:

– La pordo estas fermita, mia sinjoro ekscelenca! Mi estas ĉi tie. Kion vi ordonas, mia sinjoro?

– Ĉu vi estas ĉi tie? Kie estas Anika?

Olej ekskuis sian barbon kaj karesadis sian frunton.

– La knabino ne estas servistino de la bienego. Mi kaj mia junpaŝtisto estas viaj servistoj. Vi ne povas ordoni al la knabino.

La princo miris pri ĝi.

– Kion signifas via diro?

La ŝafmastro paŝis al la princo levante siajn pugnojn. Liaj muskoloj videblis, sur lia frunto videblis la angioj kaj li furioze diris:

– Tion mi volas diri, se vi ĉasadas ĉirkaŭ la ŝafejo kaj en via pafilo kartoĉo estas por birdoj, tiam povas okazi, ke anstataŭ birdo, urso staras antaŭ vi.

Poste li batadis per siaj pugnoj sian bruston kvazaŭ li dirus: „Tiu urso mi estas!”

La grandpotencon havanta sinjoro ne estis kapabla respondi, ekvidante la furiozajn okulojn de la ŝafmastro. Liaj piedoj komencis tremeti. Ankaŭ la pafilo tremetis direktita al Olej.

– Ĉu vi forgesis, kiu mi estas?

– Mi scias, kiu vi estas. Vi estas mia mastro, sed vi same ne forgesu, kio mi estas – diris Olej.

– Kio vi estas?

Olej levis la kapon orgojle, sed kiel heroo.

– Mi estas la patro de tiu knabino.

La princo kapbalancis kaj diris:

– Estas enorde, ŝafmastro, mi parolas kun vi dece, kiel kun iu patro. Mi volas havi vian filinon ĉiamaniere.

– Sed mi donas ŝin al vi neniamaniere.

– Kio estus via opinio, se ĉi tiun ŝafejon kaj la ŝafaron mi donacus al vi? Al la ŝafmastro oni ne povus proponi ion pli gravan, ol kion la princo diris. La fabeloj de mil kaj unu noktoj estis nur aĉaj fabeloj, sed tiu estis realaĵo. Ja li havus la ŝafejon de Brezina, la virŝafojn, la eksvirŝafojn, la aliajn ŝafojn.

Li staris balanciĝante kiel pesilo, li meditis, hezitis kaj li ankaŭ volis akcepti la proponon kaj ankaŭ ne.

La princo ĝojis pro la hezito kaj meditado.

– Vi estus mastro de Brezina.

La ŝafmastro forte pensadis. Li vidis la estontecon. Li povus porti orbukon, li havus silkoĉemizon, boteleton pri brando. Ĉiu levus la ĉapelon antaŭ li por saluti lin. Li havus multe da trezoroj, kio estus pli multe, ol la havaĵo de la reĝo de la prusoj.

Olej konsciiĝis.

Oni dirus al vi: „Kiu donis al vi la multon da trezoroj? Kial vi ricevis? Ne estas bona la troa estimo, se sekvas vin nigra ombro, la sinakuzo!” – Nu, decidu!

– Ne! Lasu min vivi trankvile! Mi estas honesta servisto de via patro kaj ne primoku min!

– Ne hastu decidi! Mi ne havos ĉiam saman proponon. Neniu rifuzas ĉi tiun proponon. La knabinon mi amas, kiun mi portos en Vienon, ankaŭ ŝi amas min kaj volonte sekvos min. Do! Decidu! Maljuna ŝafmastro! Donu vian manon!

La maljunulo ŝvitis kaj diris:

– Neniam!

– Vi estas freneza kaj stulta. Komprenu tion, kion mi volas fari. Fermu la okulojn, ne grincigu la dentojn, ne kriegu al la homoj! Mi donacas al ci la ŝafejon kaj la ŝafojn. Tiuj estas senkoruptaj. Sed mi fuĝigos vian filinon sen via scio. Tion donas la sorto, kiun vi ne estos kapabla malhelpi.

Olej turnis sin.

– Kial vi diris tion al mi? – stentoris Olej – vi devintus fari sen mia permeso. – Ĉio estas enorde, tion mi faros sen vi – diris la princo rigardante la ŝafmastron. Dio benu vin!

Poste la princo subite turnis sin kaj fajfadante foriris.

Olej ekŝanceliĝis, apogis sin al la muro. Li apenaŭ havis forton. Li volis postkrii al la foriranta princo, sed ne kapablis paroli. Li rigardante la princon riproĉis tiun kaj malestimon sentis pri tiu.

Li ŝanceliĝante iris en la ĉambron, kapturniĝis, havis turmentajn pensojn, kiuj kunpremis lian koron.

– Ho, ve! Mi havas kolikon!

Rokaj montopintoj reeĥis la vorton „koliko.” Olej sciis bone, ke tio estas ne prava. La homo mensogas al si mem. Li atingante la ĉambron enlitiĝis kaj kredigis sin, ke li suferas pro la koliko. Unue li ĝemis kiel iu sovaĝbesto, poste lia vizaĝo iĝis fantomeca, fine li plifaciliĝis kaj komencis kanti.

Povas esti, ke la kantoj forpelas liajn terure nigrajn pensojn. Li longtempe suferis kaj pli malfrue ekaŭdis la paŝojn de Anika en la korto.

– Ŝi alvenis kaj ekvidos min! – li kriis kaj eksaltis kiel frenezulo.

En la spegulo li ekvidis sian furiozan vizaĝon. Li kriegis, kuregis al la spegulo kaj perpugne terure forte batis sur sian spegulan bildon. Lia mano eksangis pro la vitro de la spegulo per lia bato disrompita. Kiam Anika alvenis portante la mesaĝon de Lapaj, tiam li kuŝis sur la planko senkonscie. Anika ne sciis, kiun malbonon li havas, sed rapide akvumis lin, kaj enlitigis lin. Tutnokte li deliris, luktis en sonĝo kontraŭ mirindaj monstroj, kiuj volis manĝi liajn koron kaj hepaton.

Matene li fartis pli bone, ol nokte. Li ne vekis sian filinon. Sed li kaj Matjo sen matenmanĝo peletis la ŝafaron.

Estis bela somera mateno. La naturo serene ridetis. La ŝafoj gaje paŝtiĝis el la rosa herbo. La birdoj gaje pepadis. Laŭvorte la mateno estis agrabla, pri kio la poetoj verkas versojn, kantojn. La naturon la fantazio ne kapablas plibeligi, nur kapablas plimalgrandigi. Ĉio estis gaja, sed Olej estis moroza, Matjo estis malĝoja.

Olej estis malbonhumora. Estis bone kuŝi kaj peleti la ŝafaron sed promeni estis lacige, pensi estis turmente, ĉar la pensoj konstante persekutis lin. Li ne estis kapabla diri al la pensoj: „foriru de mi!”

– Kio okazos pri Anika? Ja li volis vendi sian filinon por trezoro, por la bieno, sed li diris: „Neniam!”

Tiun vorton eĥis la arbaro kaj la voĉo, kiu ekde dek ses jaroj ne lasis lin, nun riproĉis lin: „Tomaso! Tomaso!”

Tio estas terura, ke la koltintiloj de la virŝafoj diras rimante: „Vi vendis la ŝafejon por honoro!” Matjo peletas la ŝafaron, sed pensas, ke la ŝafmastro freneziĝis.

– Hej, junpaŝtisto, deprenu tiujn kolsonorilojn. Lasu la ŝafaron. Metu sur vin la ŝafistpelton. Kioma horo estas?

– Estas frua posttagmezo.

– Iru al Talár.

– Mi komprenas, mia sinjoro-mastro.

– Iru en la kastelon de la princo kaj diru, ke vin sendis la ŝafmastro de Brezina, ke li volas paroli kun la princo.

Matjo treege atentis kaj preskaŭ ekhaltis lia spiro.

– Se vi iras en la kastelon, tiam iru antaŭ la princon kaj diru al tiu laŭvorte: „Mia moŝta sinjoro! Tion mesaĝas la ŝafmastro de Brezina, ke el tiu afero nenio estos kaj tiun li ne volu realigi.” Ĉu vi komprenis? Hastu!

Matjo estus tre ŝatinta ekkompreni pli bone, kio estas tiu afero, sed la fiera ŝafmastro ne toleris la demandadon. Sed li sentis, ke tiu mesaĝo ne plaĉos al la princo.

Li dum la posttagmeza manĝado alvenis reen.

– Kion mesaĝis la princo? – demandis lin la ŝafmastro obtuze.  
 – Nenion, mia sinjoro mastro, sed eĉ pli malmulte.  
 – Ĉu povas esti, ke vi ne parolis kun tiu? – demandis la ŝafmastro.  
 – Tie ne. – Matjo respondis trankvile.  
 – Ĉu mi ne ordonis tion? – li demandis furioze.  
 – Tio estas prava, ke vi ordonis ... sed la princo hodiaŭ tagmeze forveturis al Vieno. Tien mi ne povis postiri lin, – diris la junpaŝtisto kontraŭadante kaj kredis, ke li portis bonan mesaĝon.  
 La ŝafmastro nenion diris, sed iĝis furioza kaj ege paliĝis. Li prenis la ŝafistpelton kaj kuregis hejmen kiel frenezulo.

Kion li antaŭsentis, tio estas prava.

Antaŭ la domo estis freŝaj spuroj de ĉaro. En la ĉambro neniue estis.

Sur la tablo estis la labortaga vestaĵo de Anika: tuko makulita, korsaĵo, ŝtofa jupo brodita per orfadeno kaj flava feljako. Sur la feljako estis metita iu dokumento, sur la sigelo de la princo. Sur la sigelo estis leono, kiu prenas glavon per siaj dentoj. Tiu dokumento estas la donacanta dokumento pri la ŝafejo kaj la ŝafaro.

La ŝafmastro sentis sin, kvazaŭ iu puŝis tranĉilon en lian koron ekvidante la menciitaĵojn. Li ekkomprenis ĉion. La sinakuzo estas antaŭsentita. La princo tion faris, kion tiu diris. Tiu agis ege rapide.

La maljunulo ĉirkaŭrigardis kaj komencis kriegi malesperiĝinte:

– Anika! Anika!

Li sciis, ke respondo ne venos. Anika jam proksimiĝis pertrajne al Vieno.

Poste li subite silentiĝis. Li ne estis malĝoja, sed spitema. Li sidiĝis sur la sojlo de la pordo, li metis tabakon en la pipon kaj ekbruligis tiun. Li flegme puŝblovis la fumon kaj meditis: „Ĉu estos pluvo morgaŭ?” Li subite ekstaris kaj minacis la ĉielon per sia montra fingro.

– Ĉu vi aŭdas, Dio? Mi montros al vi hodiaŭ ion!

Poste li denove sidiĝis, kvazaŭ li havus neniun laboron. Li pipfumis.

Nur tiam li ekstaris, kiam Matjo peletis la ŝafaron hejmen.

– Bone estas, ke vi estas ĉi tie, mia filo. – li diris afable al la junpaŝtisto. – En la ĉambro sur la tablo estas iu grava dokumento, kiun tuj vi devas porti al Talár al la sinjoro intendanto por sendi al la princo. (Pli frue li neniam parolis afablavoĉe al la junpaŝtisto.) Sed tiu ne sigelu hodiaŭ, nur morgaŭ.

Nome tiu havos alian skribindaĵon.

– Tuj mi eniras por tiu, sinjoro-mastro.

– Ne lacigu vin, mi portos ĝin.

– Sed mi ŝatus peti de Anika unu pladon da kuiritaj manĝaĵoj.

– Ne ĝenu ŝin. Mi donas monon al vi, vi povas manĝi kaj trinki dumvoje.

Matjo kapbalancis. Kial li ne povas eniri en la ĉambron? Ĉu ŝi ploris? Ĉu ŝi dormas, li ne sciis. Matjo volis vidi ŝin ankaŭ nun, kvankam li vidas ĉiutage. Kiom stranga estas la amo! Nu, ne gravas. Hodiaŭ ŝi nur priplorus la princon, morgaŭ ŝi jam denove amos lin. Denove la fluto estos sur la dorso kaj ne pafilo.

Matjo bonhumore forportis la dokumenton al la funkciulo. Olej postrigardis lin kaj kiam Matjo malaperis, tiam li iris en la ŝafejon. Li rigardadis la ŝafojn, kiujn li ege ŝatis, murmuris nekompreneblajn vortojn, finfine li komencis ploregi kiel infano.

Li tiris la ĉapelon sur siajn okulojn, volis vidi nenion. Li eliris el la ŝafejo. Li fermis per ŝlosilo la pordon de la ŝafejo, kion neniam kutimis fari. Poste li iris al la puto kaj la ŝlosilon ĵetis en la putakvon.

Jam komencis malheliĝi kaj li komencis plenumi sian planon. Estis sur la korto fojnostaketo de sekaj kanoj. Tiun li disportis ĉirkaŭ la ŝafejo. Li surmetis la ornaman

ŝafistpelton, ekbruligis la kanon proksimume sur ses lokoj kaj la brulantan fojnon li ĵetis sur la tegmenton de la ŝafejo.

La vento pliigis la flamojn, kiuj rapide pliĝis.

Poste la fama ŝafmastro de Brezina kuris trans kavoj-arbustoj kaj ne rigardis reen. Kial li rerigardu? Li sciis, kio okazos. La flamoj heligis la pejzaĝon, kvazaŭ estus tago. La vento blovis la nigrajn flugcindrojn, kiuj flugis sur lian vizaĝon kaj kaŭzis jukon.

Kaj la ŝafmastro de Brezina kuris kaj kuris. Kien li kuris? Dio scias.

Kiam tagiĝe Matjo hejmenalvenis, tiam la ŝafejon de Brezina li vidis nenie, sur ĝia loko iu granda fumanta nigra makulo estis. Nur la karbiĝintaj traboj, nigraj muroj kaj nigraj ostoj videblis. Ĉu tiuj ostoj estis ostoj de homo, aŭ ostoj de ŝafoj?

Tio estis enigmo, pro kiu la junpaŝtisto teruriĝis. Matjo kriadis la nomon de Anika kaj la nomon de la ŝafmastro.

Sed neniu respondis.

„Mia dio! Kie ili estas?”

Sub la cindro la fajreroj brilis, sed respondis eĉ ne tiuj.

De tiam la valo de Brezina jam silentas. La densan gazonon homo kaj besto ne piedtretas. Jaroj pasas kaj sekvas unu la alian, la sovaĝpirarbo produktas fruktojn sed neniu kolektas tiujn. La herbo kreskas, poste sekiĝas, sed sur tiu granda nigra makulo ne kreskas herbo, tiu ĉiam restas nigra. Kial?

Ankaŭ la malgaja kanto nur tion diras, ke:

„En Brezina estas tiu nigra makulo...  
Sur kies loko estis iam bela ŝafejo...”



La Tero kaj ĝiaj popoloj: Ŝafistoj en la Karpatoj – Gravuraĵo, librodetalo, 1894-1905  
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=83383>

## Lapaj, la fama sakflutisto



Porkopaŝtista koncerto en Ipolyság: Sakflutisto – Foto, gazetdetalo, 1910

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=80751>

Nia ekloĝanta samvilaĝano tranĉas al si ok bastonegojn unu kaj duonanklaftojn longajn po unu. Iliajn finojn li pintigas, li pikas tiujn en la teron po unu, al la distancoj de unu kaj duono da spanoj (ĉirkaŭ je 22 centimetroj). Jene li elformas la skeleton de sia estonta restadejo. La bastonegoj montras duonrondan formon. Sur iliaj suproj li metas avelovergojn. Tiujn li kunligas kun la bastonegoj per maldikaj ŝnuroj. Tio similas al vertebra kolumno. Poste li metas same avelovergojn sur la supron, kiu jene estas simila al ripoj. Tiun kreaĵon li subŝtofas flanke per branĉetoj, herbaĵoj kaj sur la tuton li metas tegmentopajlon. Ĉi tiel fariĝis la kampgardista-kabano, la policpalaco.

Tiu havas prestiĝon kaj esprimas timon super la parceloj, kaj ĉiuj bonaj kaj malbonaj homoj irante apud ĝi kunestime salutas tiun. Ĝi estas pli malgranda, ol la departementdomo, sed ĉi tie komenciĝas la venĝopuno de la malicaj agoj.

Sed la kamp-gardista kabano nur tiam estos inda doni punantan veron, se antaŭ ĝi estas unu nigra makulo, kiu estas la signo de la pundona vero, kies personiĝanto estas Iŝtók Lapaj, la fama sakflutisto, kiu ĉe fajro de la branĉfasko bakas la terpomon kaj kelkfoje ankaŭ neaĉetitajn viandojn, kies akiron li heredis desliaj antaŭuloj ŝafistaj.

Sed la prestiĝon de la kamp-gardista kabano pliiĝis tiu nodbastonego kiel simbolo de la prestiĝo, kiu estas apogita al la kabano, kun surmetita la „halina”-(felto)-o. Tiukaze certas, ke la kamp-gardisto estas en la kabano, kiu vigle atentis inter la vergoj la limon de oriento ĝis okcidento. Tiukaze eĉ la leporoj ne kuraĝas iri tien.

Sed eĉ ne tio estas malebla, ke la tuta afero estas nur senhonora artifiko. Nome, dum la nodbastonego kaj la felto gardas la limon, ĝis tiam Lapaj aliloke vagadas, ĉar lia tereno estas ege granda kaj bezonatas scienca scio, ke lian scion iu ajn povu tiom perfekte ellerni, kiel li. Kaj li volas pliiĝi ĝin konstante.

Li ne estas nenifaranto, ĉar kiam li kuŝas surdorse kaj vidas la sunon, tiam la aliaj homoj ne pensas, ke lian malfacilan laboron donas la nokto. Lia oficiala laboro komenciĝas vespere. En la naturo ĉio dormas nokte, ĉie estas silento, sed li devas esti atentema kaj vigla. Kiam sur la monto Fatro brulas fajroj de paŝtistoj, la nuboj igas malhela la pejzaĝon kaj la akvo de la poeta rivereto Garam aplaŭdas:

„Ĉop, ĉop, ĉop!  
ŝteli nun estas tempo!

Sed la rivereto ne pravos, ja Lapaj vidas plej bone en la malhelo. Li ekstere kaŭris antaŭ la kabano. Sian fajron li estingis, ĉar la fajro perfidas la kamp-gardiston. Nome oni vidas lin jam de malproksimo, sed li vidas eĉ ne proksimen pro la fajro. Nokte la fajron li toleras nur en sia pipo. En la pipo la fajro estas en bona loko, ja ĝi luktas kontraŭ la malseka tabako, kiun li miksis kun terpomtigoj. La folio de la terpomo ĉi tiel fariĝas hungara reĝa tabako. Tute estas egale, kian tabakon li metas en la pipon, nome gustas al li la fumo. Li kunĝoje suĉas la fumon, kreas el tiu fumringon, kiu flugas supren inter la nubojn kaj matene el tiuj estiĝas roso.

Nur kelkfoje aŭdeblas el la vilaĝo hundobojado kaj kokokrio. Tiuj gardas la vilaĝon kaj la kampon. Lapaj konas tiujn kaj preskaŭ ekkomprenas tiujn. Li aŭdas voĉojn de la vilaĝanoj, li konas tiujn. Unu estas Viskoĉa de Matiaso Skvarka, la alia estas Ulan de Marteno de Lipták. Ili estas fidelaj hundoj, li konas ankaŭ la kokojn, kiuj maldormas super la limo kaj similas al iu preciza horloĝo.

Unue komencas kokokrii la koko de la direktoro de la lernejo. (Ĝia gorĝo estas pli bona, ol de ĝia mastro.) Nome ĝi estas la plej malsata en la vilaĝo kaj kredas, ke rapidegas la alvenon de la tagiĝo. Poste, noktomeze kokerikas la kokinĉinaj kokoj de la vidvina moŝta sinjorino. Tiuj estas precizaj, nome tiuj vidas horloĝon de la turo. Poste sekvas la kokoj de la eklezia komunumo. Lapaj tiujn kapablas distingi unu de la alia, kvazaŭ li konas ĉiujn.

Tio estis scio heredita de generacio al generacio. Avo de Lapaj estis ŝafmastro en la ŝafejo de Hlina, en la ŝafistmondo tiu estis almenaŭ tiom grava rango, kiel la rango de la ĉefjupano en la ĉiutaga vivo. Lia patro iĝis simpla ŝafisto, ankaŭ li estis vivinta en la naturo kaj li ellernis ĝiajn sekretojn. Li ekŝatis la vivaĵojn de la naturo kaj pli intense ŝatis la bestojn, ol la homojn. Li zorgis pri multege da ŝafoj, kiuj estis similaj unu al alia kiel folioj de la trifolioj. La ŝafisto pli bone kapablas diferencii la ŝafojn, ol la sciencistoj la diversajn sciencojn. La ŝafisto kapablas ekkoni siajn ŝafojn ankaŭ tiam, se tiuj estas en fremda ŝafaro, ĉar la ŝafisto konas la devenon de siaj ŝafoj, li konas iliajn kaŝitajn trajtojn, ja li memoras ankaŭ pri iliaj patrino kaj avino. Mi kredis, ke tio estas nur fabelo, sed pli malfrue mi konvinkiĝis pri ties pravo.



Lapaj heredis sian observantan kapablon de la prauloj, kvankam li ĉesis esti ŝafisto, sed li estis talenta kampogardisto. Lia patrino estis la naturo, liaj parencoj estas la bestoj. La patrino ne estas duonpatrino, sed estas pli bona, ol la homoj. La bestojn oni kapablas ekkoni, sed la homojn ne.

Nome la ĉevalo malbonigas la brasikon, se oni lasas tion fari. La hundo piedtretas la ĝardenon, la bovo manĝas la luzernon, kvankam ĝi scias, ke ĝi ŝveliĝas de tio (nu ĝi tial estas la malfeliĉa bovo). La porkido plugante la teron, serĉas la manĝeblajn aĵojn.

Dum pri la bestoj eblas scii jam anticipe, kian damaĝon ili kapablas fari pelate de sia instinkto. Sed, la homo kapablas agi ruze, inside, kaŝatentante la dormon, la malhelon, la foreston de Lapaj. La homo eluzas ankaŭ la aŭtunan nebulon kaj kion vidas la du okuloj, liaj du manoj prenas kaj ŝtelas la produktaĵojn. La homon ne eblas ekkoni. Ja tiu montras amikan vizaĝon al Lapaj, regalias lin per cigaredo kaj brando el la ladbotelo kaj li pensas, ke tiu pro la amikeco venis al li. Sed pli malfrue li spertas, ke malaperis la plej bela brasiko kaj melopepo. Sur la pli lastan la moŝta sinjorino ĉizis ŝian nomon.

Ĉu estas miraklo, ke li ne ŝatas la homojn? Li pravus, se li suspektas pri la homoj. Li ne havas kontakton kun la homoj. Kiel li estis kapabla ellerni paroli? Li forgesis la parolon.

Pri kio kaj pri kiu li parolu? Li ne havas ĝojon, malĝojon kaj pasion. Ja ili, la slovakaj samvilaĝanoj, estas pli sensentemaj, ol la hungaroj. Ili estas pli frigida raso, ol la hungaro. Ĉe ili la suno pli malfrue leviĝas kaj pli frue subiras kaj malforte varmigas ankaŭ tagmeze. La naturo jam konas ilin kaj ne kolerigas ilin.

Iliaj fruktoj estas la juglando, avelo, ilia grundo estas ŝtona, roka, ili ne portas festan vestaĵon kaj malofte estas ĉe ili bona vetero, la sunbrilon kovras la grandaj neĝmontaroj. La venton, tempeston gardas la monto Fatro, sed la vento de la tempesto ilin atingas unue. La printempo nur somere alvenas kaj anstataŭ somero, alvenas la vintro, kiam neniun atendas tiun. Sed tiu popolo estas kontenta, silenta kaj tolerema.

La naturo petolas. La spiko de la tritiko restas pli mallonga, ol en la ebena kaj la tritiksemo restas malbonkvalita. La brasiko ne faras kapon, la piro estos sovaĝpiro kaj ĝia gusto estas ege acerba, tiel, ke kiu enmordas ilin, pro ilia gusto tiu pensas pri Siberio.

Eĉ ankaŭ la poezio de la amo estas pli acerba, senkolora kaj stranga, ol aliloke, kie ĝi estas varmiga, fajra kaj revema:

„Mi sidis apud mia amatino,  
Niaj koroj ekpulsis, niaj vizaĝoj ruĝiĝis,  
Kaj jam-jam ekkokus la unua magia kiso,  
Sed tiumomente mia pipo estingiĝis kaj  
mi devis foriri, ke mi plenŝtopu ĝin.”

Ĉi tiu poemo ne estas ŝerca poemo, sed malĝoja melodia kanto. La fraŭlo priploras la sorton, kiu neniigis la dolĉan momenton estigante la fajron de la pipo. Ja sen fajro ne brulas eĉ pajlo<sup>(Z)</sup>, sen fajro ne naskiĝas feliĉo. Nenia feliĉo estas perfekta en la mondo.

Ĉi tiun kanton Iŝtók Lapaj kapablas muziki ege bele per sia sakfluto. Sed li ne sentis amon. Li neniun amis. La vizaĝo de iu fraŭlino ne kapablis fascini lin. Sed li vidis multe da fraŭlinoj dum la nuptaj festenoj. Ja li muzikis multe da kantoj. Al multe da fraŭlinoj plaĉis lia muzikado.

Kie li ellernis tiujn kantojn, kiujn li muzikis dolĉe, doloreme, malĝoje kaj rapide? Dum la muzikado lia koro preskaŭ krevas pro malĝojo, sed plie moliĝas kaj estos dolĉa kiel mielo. Sed se Lapaj muzikis malĝoje, tiam li iĝos amara, se li muzikas malgajan kanton, li estos venena, kiel mielo, kiam venenero falas en ĝin.

Kiu estis la majstro de la filo de la naturo? Ja li konversacias kun neniun. Povas esti, ke lia koro instruis lin. Ne. Ja tiu estas fremda. Nek la montoj, nek la valoj instruis. La ĝardenaj plantoj ne entuziasmigis lin. Tiuj ne laŭdis lin. Kiu donis al li la kapablon por sakfluti? Do,

junŝafisto, kiu en infanaĝo instruis lin sakfluti. Li estis fuŝulo al la muzikado kaj en la regiono aliulo ne komprenis tiun arton. Sed en la departemento Nógrád loĝas Hiksum, kaj en Nitro vivas Petruŝ, kiuj kapablas sakfluti.

Lapaj neniam foriris el sia regiono escepte sian junaĝon, kiam lin ekkaptis la nacia alvokiĝo, kaj protektis la pli malfortajn kaj ribelis kontraŭ la sorto. Cetere la tót-oj (slovakoj) ne estis ribelantoj. Lapaj duonjaron aventuradis en la mondo, sed poste enuis pri tio kaj hejmenirante li iĝis kampogardisto.

Li ne troe menciadas sian transoperencian<sup>21</sup> vojon, sed la estiminda luterana pastro, kiu akiris la saĝecon inter la prusoj, tion disvastigas inter siaj piaj kreduloj. Foje post dujara foresto li revante promenas sur strato de Berlin kaj ekvidas sian samvilaĝanon, infanaĝan kunulon, kiu estis dratumisto, estante ege malpura.

– Ĉu vi estas tiu, karega Iŝtók? – tiu kriis brakumante.

Lapaj flegme klopodis liberiĝi de la brakumo.

– Nu, mi estas Iŝtók! Do, kion vi volas?

Poste Lapaj iris plu ne sentante ĝojon pro la renkontiĝo.

– Lapaj! Haltu! Ĉu vi ne rekonas min?

Efike de tio nia heroo tamen turnis sin kaj kolere respondis:

– Nu, kion vi volas? Ĉu vi estas studentfilo de la estiminda pastro? Ĉu vi volas dratigi ion?

Kiam la estiminda sinjoro rakontis ĉi tiun epizodon, kiun li multfoje menciadis, ĉar multe da homoj malaperas en la mondo, tiam li devis paroli pri la malaperintaj homoj. Nome tio estas memoro de iu junaĝa petolaĵo, pro kio tiu epizodo multfoje estis menciita antaŭ la kreduloj. Ankaŭ pro tio, tiu menciadis la epizodon, ĉar ĝi anoncis, ke la slovakoj ne estas malfortaj kaj ne estas sentemaj pri la naskotero kaj Lapaj estas dekadencinta homo, kiu por tio iĝis kreita, ke li portu kalpakon kies ĉapelo havis larĝan randon en la 19-a jarcento.

Spite de ĉio ĉi, la estiminda pastro ŝatas la kamp-gardiston, Lapaj. Kiam Lapaj ne povas esti ekstere vintre, tiam li loĝas en la forlasita muelejo. Pro tio Lapaj devas gardi la muelejon ĝis printempo. Vintre en la muelejo li faras korbojn, abeluojn el vergoj, ŝovelilojn kaj rastilojn.

Tiu loĝejo estas enuiga, la laboro estas malmulte rezulta kaj homo malofte venas tien. Sed lupo oftas. Iu samregionano venis ĉi tien dum karnavalo, kiu petis la sakflutiston muziki, ĉar okazos geedziĝa festeno en iu domo. Li volis marĉandi pri lia muziko kaj entute kiel muzikas Lapaj.

Vere, ĝenerale multe da diskutoj ne estas, ne okazas marĉandado, nome la muzikarto de Lapaj havas antaŭe fiksitan prezon kiun oni devas pagi. Tio estas kvar kilogramoj da tabakoj, noktomeze ok decilitroj da prunbrando, fru-matene kvar decilitroj da prunbrandoj, multe manĝi kaj ok groŝoj en kontanta mono. Tio estas kaj multe kaj malmulte. Ja pri la sakflutisto de Kékkő<sup>22</sup>, la barono Balaŝša pentrigis bildon de itala pentristo kaj la bildon metigis en la ĉambregon de la palaco inter la bildojn de ĉefĵupanoj kaj palatinoj. Petruŝ-on, la sakflutiston de Nitro,<sup>23</sup> la grafo de Nitro pagas por sia amuziĝado kaj banas en vino kaj abundmanĝigas.

Sed Lapaj estas la plej fama. La antaŭaj sakflutistoj estis ege ĵaluzaj. Iunokte ili vizitis la kampogardiston en lia kabano portante pseŭdovestaĵojn kaj pagis po ok groŝojn por kanto. Nome ili volis eksci iom pri la fameco de Lapaj.

---

<sup>21</sup> La esprimo Operencia – signifas – ĉe la hungaroj – fabelan landon, trans la operencio: montras la teron, landon trans la konataj teritorioj – noto de la unua provleginto: Adrienne Pásztor.

<sup>22</sup> Kékkő estas urbo en Slovakio. Pri ĝi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Modr%C3%BD\\_Kame%C5%88](https://eo.wikipedia.org/wiki/Modr%C3%BD_Kame%C5%88)

<sup>23</sup> Nitro estas urbo en Slovakio, pri ĝi abunde ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Nitro>

Iŝtók muzikis melankolie, dolĉe-elegie la plej malgajan kanton de la montoj, kiun ankaŭ la Luno aŭskultis gapante, pro la plezuro ebriiĝinte kaj ankaŭ la riverondoj ĉesis murmuri por ne ĝeni:

„Hej, la malĝoja ŝafejo,  
Tie en la neĝmontaro;  
Manka estas la ŝafaro,  
Ŝafmastro estas en kateni.”

Hiksum ne atentis la finon de la kanto, sed forkuris hontante al la fino de la mondo. Petruŝ komencis plori kiel infano kaj hejmenvenante disrompis sian sakfluton, kiu estas nun jam aĉa zumfero antaŭ liaj okuloj, sed la instrumento de Lapaj estas majstroverko, de kiam li aŭdis la muzikon de Lapaj. Kiam Lapaj muzikas per tio, tiam en tio aperas la spirito de Pokolka, nome la iama nigra ŝafido, kiu pro tio venis nokte de Luca, ĉar ĝi estas iu malbenita reĝidino kaj pro la danko de zorgo de Lapaj, ĝi elspiras belegajn kantojn, kiam Lapaj movas la fajfilojn. Aŭdante la kantojn, la neĝo degelas de la monto Fatro en februaro. Sed ne Iŝtók muzikas, se li metas sian buŝon al la fluto, ĝi movas la fajfilojn kaj tiel faras, kvazaŭ li muzikus.

Sed neniuj sciis, de kiu ellernis Lapaj la belan muzikon. Oni meditis nur pri tio, kaj ili fine diris, ke la sakfluto havas magioforton. Nome tiu sakfluto estas el la ledo de iu nigra-lana ŝafido. Ekzistas homoj, kiuj konis tiun ŝafidon. Nokte de la nomtago Luca, noktomeze iu vojerarinta fulgonigra ŝafido kaŝiris mekante inter la ŝafojn de la forpasinta Lapaj, kiu donacis tiun al la infano Iŝtók, pensante, ke ĝi havos mastron. La infano ege ŝatis tiun beston, li ludis kun ĝi, manĝigis ĝin el sia mano, donis al ĝi freŝan herbon kaj salon. La ŝafido same ege ekŝatis la infanon. Sed tiu ne estis kapabla paroli. Iŝtók nomis ĝin Pokolka. (Infereto/nome la 13-a de decembro estas laŭ la onidiro la Tago de la sorĉistinoj, kaj la nigraj bestoj estas servistoj de la diablo.)

Sed kiam post dek tri jaroj la ĥolero, post la homoj ankaŭ la ŝafidojn dekumis, tiam ankaŭ Pokolka iĝis viktimo de la reginta epidemio. Danke pro la ricevita amo, sian ledon ĝi lasis al Iŝtók kiel memoron por fari el tio tion, kion li volas.

Nu Iŝtók faris el tio sakfluton. Tio estis belega arta sakfluto. Ties supra fajfilo estis arĝenta, kaj la malsupra parto estis farita el kupro. Eĉ sankta Davido ne havis same belegan ilon.

La petruŝ-an imagon fascinis la multe da fabelaj paroloj kaj ĉiumaniere li volis akiri la sakfluton. Sed tiu instrumento ne estis aĉetebla. Sed spite de tiu, ke Petruŝ proponis doni por la instrumento cent talerojn (tiun koston Elio, la judo proponis al tiu) Lapaj nur priridis tiun, sed ne vendis la sakfluton. Kiel li devus ricevi monon? Ja li eĉ ne siajn rimensuojn vendas por unu reĝlando, tiom malpli sian solan trezoron, la sakfluton. Vane diris Elio, ke por tiu mono li povas aĉeti tri flutojn kaj restas multe da mono kaj li estos pli riĉa ol Rothschild.

Sed Iŝtók Lapaj tute ne volis esti pli riĉa ol Rothschild. Prefere Elio tion devus diri al li, ke liaj brullignoj estos poluritaj, per kiuj li povas baki la terpomon kaj havos glatan silkoĉemizon kaj la ŝafmastro de Brezina salutos lin levante sian ĉapelon. Tiuokaze li ekkomprenus, ke la fluto donus al li grandan profiton.

Laŭvorte la sakfluto ne estis vendita. Pro tio Elio ĉagreniĝis kaj diris al Petruŝ, ke la instrumenton eblas nek akiri, nek aĉeti, nek forŝteli. Nome tage li portas ĝin surŝultre, nokte ĝi estas sub lia kuseno. Neniu povas forpreni tiun, ja li ne estas ebria.

Sed Elio menciis, ke Lapaj estas jam maljuna kaj baldaŭ mortos kaj la sakfluton tiu homo ricevos, kiu entombigos lin. Pro tio se Petruŝ diras la adreson kaj antaŭmonon al Elio, tiam tiu informos lin pri la morto de Lapaj. Petruŝ konsentis pri la ideo, kaj li sciigis Elion pri la adreso de sia ektrovejo: trans la arbaro de Brezina troveblas iu ruina muelejo. Tie komenciĝas la valo Roĉka (sitelo). En la valo kondukas tri piedvojoj. La mesaĝanto iru sur la neprizorgita vojo ĝis la monto Motika, iru sur la pinton de tiu kaj tie li vidos fajrojn de paŝtistoj. Li iru al

la plej granda fajro. Tie estas Petruŝ. Sed se tiu ne estas tie, oni diros, kie li estas. La cent taleroj ĉiam estos ĉe Petruŝ, kio estas la kosto de la sakfluto.

Lapaj nenion sciis pri la marĉandado, nome Elio diris al neniuj. Lapaj ankaŭ ĝin ne sciis, ke liaj gastoj estis Petruŝ kaj Hiksum. Li daŭrigis flegme la malnovan vivon, kun homoj ne paroladis, la Naturo estis lia amiko kaj kun tiu li sin amuzis. Li muzikis, kiam estis silento, aŭ li aŭskultis la muzikon de la valoj kaj rokoj, la herberoj moviĝis, la floroj donis bonan odoron. Se Lapaj estis en silento, tiam li aŭskultis la naturon, muĝon de la arbaroj, plaŭdadon de la rivero, zumadon de la abeloj, la kanton de la laboristoj de la arbaro. Tiuj estas en perfekta akordo, kiujn aĉa instrumento ne kapablas interpreti. Iŝtók-on oni ne devas serĉi, nome la sakfluto ĉie ĉeestas kaj oni nur devas ekkompreni ties voĉon.

Ĉu ne la naturo, la patrin-tero instruas al ni ĉion? La tero havas koron. Kiu premas la orelon al la korpo de la patrin-tero, tiu aŭdas frapadon, kvazaŭ martelo frapadus, kvazaŭ la koro de la patrin-tero batus.

La tero ankaŭ pensadas. Ĝi pensas pri la floroj. Nome la plantojn en la ĝangalo neniam homa mano plantis, nek birdo disvastigas la semojn de la plantoj. Spite de tio estiĝas neniam viditaj plantoj, kiuj floradas. Tio estas poezio de la tero! Tiuj estas kreaĵoj de la tero.

Se la tero pensas kaj havas koron, tiam ĝi havas ĝojon kaj malĝojon. Kiam estas seka vetero, la mallarĝfolia oleastro (eleagno) malforte kreskas, sed se fru-matene estiĝas roso, tiam la kreskaĵo fortiĝas, ĝia tuto estas gaja rideto.

Ankaŭ la plantoj pensadas kaj sentas. Nome ili ŝatas la teron, la planto ŝatas la nubon kaj sunradion. Se la planto de la hungara homo sekiĝas, aŭ ne bele evoluas, tiam oni diras: „Tiu ne ŝatis la teron.” La bonkora tero diras al kara mortinto: „Estu peza por tiu la tero!” Sed por tiu la tero jam estas malpeza.

Bazo de ĉio estas la amo, ĝi kunmetas ĉion. Ĉu nur Lapaj ne estus kapabla ami? Kiu scias tion? Se neĝo kovras la monton Fatro<sup>24</sup> kaj ne anoncas, ke el ĝi fontas viviga varma fonto, viviga forto por la plantoj, tiam ne estas en ĝia interno fajro kaj ne erupcios el la kratero sur la ternivelon, se sur tio estiĝus fendo.

La malĝoja stipo, kio sen amo kreskis tie kiel iu griza haro, nur la malvarmon konas, sed ne scias, kio estas en la monto.

Nun estas malserena aŭtuna nokto. La tranĉa frosta vento blovante malvarmajn pluvogutojn ĵetas al la vizaĝo de Lapaj. Li tamen ne rapidas al sia kabano, male li rigardas la pejzaĝon, ja la produktitaj fruktoj, legomoj estas en danĝero. Nome la ŝtelistoj ĉi tiun malbonan veteron eluzas por ŝteli. Nun estas malhelo. Nun kiu ajn povas mortbati la kampgardiston inkognite. Nun okuloj kaj oreloj de la kampogardisto estas malfermitaj kaj atenteme rigardadas kaj streĉas la aŭdsenson.

Li estas en silento kaj kaŝobservas. Neniu brueto estas. Nur iu brasiko krevas pro la pluvo. Kelkfoje leporo kuras inter la plantoj. Sed nun subite li aŭdas homajn paŝojn en la kota grundo.

Li hastas en la direkton de la paŝoj. Li havas jam grandan ekzercon de la rekono de la irdirektoj. Li jam konas la paŝojn de la homoj. Iu iras de la kabano al la riverego. Li kaŝirante atendas la figuron malantaŭ iu avelarbusto. Nome li ne volis frue forpeli la ŝteliston. Li devas esti persista. En la sama malbona vetero nur la hundo kaj la kampgardisto ne hontas esti ekstere.

Apud la avelarbusto iu alta virina figuro kaŝiras, kies okuloj brilis kiel tiuj de lampiroj. Ŝia staturo estas svelta, sur tiun algluiĝas iu malseka blanka littolaĵo. La du pendantaj finaĵoj de la littolaĵo flirtas krispiĝante de la vento. La vento forte ridis malantaŭ tiu kaj Lapaj tiom forte

---

<sup>24</sup> Pri la bela slovacia montaro Fatro, vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Granda\\_Fatro](https://eo.wikipedia.org/wiki/Granda_Fatro)

fajfis per siaj fingroj, ke la malnova monto Fatro povis kredi, ke iu vaporlokomotivo kuradas tie.

– Ho! Haltu! Kiu vi estas? Kion vi portas?

La virino turnas sin kaj videblas, kvazaŭ ŝi portus pezajn aĵojn kaj malfacile pene portas tiujn. Sed iu milda voĉo respondis:

– Mi portas nur min. Nur min. Nur min. Se vi ne kredas, tiam rigardu mian antaŭtukon, mi nenion ŝtelis. Lasu min iri plu.

Lapaj iris al la virino kaj kaŝrigardis, sed ne estis suspekta signo, pro kiu li devus traesplori ŝin.

– Lasu min plu iri – ŝi diris denove amare – mi iras malproksimen.

Iŝtok-on ne interesis la longo de ŝia vojo. Kiu ajn povas veturi kien ajn, ankaŭ en Usonon, li devas nur gardi la parcelojn. Li turnis sin kaj ekiris reen. Sed la virino hezitante iris al li. Ŝi ekkaptis spasme la pendantajn manikojn de lia felta pelto.

– Haltu iun momenton, ja mi volas diri ion. Oĉjo Lapaj, ĉu vi rekonas min?

Kiu mi estas?

La kampogardisto skuis la kapon, kio signifis, ke li ne konas ŝin. Sed kial li konus tiun, kiu nenion ŝtelis? Ne, tiun li ne konas.

– Rigardu min pli bone – ŝi balbutis tremetante frostotremante, kiu havis al alabastro similajn blankajn dentojn. Rigardu miajn hararon, okulojn, vizaĝtraĵojn palajn kaj diru al tiu kompatinda, kia mi estis.

La maljuna Lapaj neniam havis similan okazon. En la malhela nokto iu svelta virino premiĝas al li kaj ĝisduone falante sur lian ŝultron diras:

– Ho, rigardu min!

Ĉi tio estas tiu afero, pro kiu ne eblas decidi sen pipfumado. Do, Lapaj nenion diris, sed sian ĉapelon metis super la pipon defendante tiun kontraŭ la pluvo. Poste li metis tabakon en la pipon kaj ekbruligis tiun. Ĉe la lumo de la alumeto li ekvidis la okulojn de la virino. Li embarasite rigardis la virinon, kio ne estas miraklo, ja li neniam vidis similan hominon. Ŝi estis belega. Ŝia nigra harplektaĵo malligite falis sur la blankan littolaĵon kovranta la ŝultrojn, sur ŝia vizaĝo videblis doloro, en la okuloj estis malesperiĝo kaj ŝiajn lipojn movis nevidebla preĝo. Ŝi portis verdan jupon, blankan antaŭtukon havantan ruĝajn franĝojn laŭ la praa slovaka modo. La vestaĵaro algluiĝis malseke al ŝia belega korpo.

Sed Lapaj ne havis impresiĝemon pri tiuj.

– Kial mi rigardu vin? – li diris pipfumante. – Dio benu vin. Sed ne ŝtelu aprikoton dumvoje, nome tiuj estas nombritaj. Tiujn havas la juna sinjoreto.

– Ĉu tiujn havas la sinjoreto? – ridis la virino doloreme spasme – batu tiun Dio kaj tage kaj nokte.

– Ne tentu Dion! – diris Lapaj – ankaŭ tiu estas amiko de la sinjoroj. Kaj Dio estas simila kampogardisto, kia mi, sed tiu devas gardi pli grandan terenon, ol la mia. Sed tiu faras sian taskon bonege. Lasu lin pace kaj foriru.

– Jes, mi foriras. La bona Dio benu vin!

Ŝi malfacile iris kelkajn paŝojn.

– Sed diru al tiu, kia mi estis.

Lapaj nevolante murmuris per sia aspra, malalta ursovoĉo:

– Al kiu mi diru tion?

La virino ekaŭdis la demandon kaj haltis iom, nur momenton, volis respondi, sed subite ŝi alian pensante, prefere ŝi komencis kuri al la monteto. Sub la monteto fluis la riverego. Ŝi de malproksimo kriis malĝoje, kion eĥis la rokoj unu al alia:

– Pardonu min, kion mi faris al vi!

La kampogardisto ĝustigis la fajron en la pipo kaj pensis: „Nu, povas esti, ke la sendia virino tamen ŝtelis ion kaj ne hontis konfesi tion. Nu, gardu vin, ja mi certe kaptos vin!”

Treege malpliigis la prestiĝo de la kampogardisto. Lapaj sciis, ke tion kaŭzis la vanteco de la sinjorino.

Ho, kiom ŝi rigardigis sin! Ho! Tiaj estas la sinjorinaj bestoj! Tiuj volas, ke oni gapu ilin ankaŭ en la malhelo. Certe ĉiuj hominoj portas ĉirkaŭ la kolo iun meĉon por lumigi la vizaĝon kiel sur la turhorloĝo la ciferplato.

Nu, ja, mi certe ekkaptos ŝin!

Sed tio neniam okazos.

Subite li aŭdas iun korskue akran ŝrikon de antaŭ la riverego kaj poste grandan klakplaŭdon. La akvoondoj bruas, kaj pere de tio unu malĝoja historio iĝis finita.

Atakis teruro, ektemis la kruro.<sup>(Z)</sup> Lapaj ne estis kapabla moviĝi pro la terura rekono. Tiu virino saltis en la akvon. Li ĉesigis la pipfumadon, demetis la larĝgrandan ĉapelon kaj metis ĝin sur la akvecan teron kaj surgenuis turnante sin al la rivero kaj findiris la „Patro nia...” komencan preĝon.

La vento malĝoje portis la vortojn de la preĝo al la ondoĉerko. Tio estis simpla morta ceremonio, sed Lapaj fervore faris tion. Almenaŭ ŝi ne forpasu kiel pagano, kiun li suspektis pri ŝtelo. Kial ŝi ŝtelintus ion? Por ŝi estis sufiĉa la preĝo, kiun li sendis al ŝi kiel voĵprovizaĵon.

Li estis iomete ankaŭ kontenta, ĉar ŝia senkulpeco evidentiĝis. li bedaŭris, ke li primokis ŝin. Li ne estis ofendiĝema, kvankam la enigmo restis.

Iŝtók rimarkis, ke li pensadas. Li provis memori la vortojn de la virino. Ŝi parolis pri la iro malproksimen (tio estas vera), ŝi malbenis la sinjoretan (ne estis malfacile diveni), sed kion li devintus pardoni kaj al kiu li devintus diri, kia ŝi estis, li ne povis eltrovi.

Sed li ne tro cerbumadis, nome li ne ŝatis la enigmojn. Ĉio estas bona tiel, kiel tio estas. La homo, la felto, la pipo, ankaŭ la sakfluto estas efemeraj, sed la tero estas eterna. Ĝia loko ne ŝanĝiĝas. La akvo de la rivero estas granda potenco, ja forportas iun parton de la tero ĉefe dum inundo.

Nu, la belan virinon forportis la akvo de la rivero. Tio ekkazis kaj neniu povas repeti tiun virinon.

Li tute malsekiĝinte atingis sian kabanon. De tie li konsideris la garditan terenon, kie estis paco kaj silento. Poste li kontente iris en sian kabanon por surmeti la sekan vestaĵon. Tiu ŝanĝo signifis, ke la pelton li sur sin metis renverse kaj de la ĉapelo deskuis la akvon. Ekstere nun la malheleco regis, do nature en la kabano estis pli malhele, ol ekstere. La sakfluton li metis en angulon.

Ni devas paroli pri la felto-pelto, kio estis familiadevena, sur ties kolumo estas kreviĵo, kiu memorigis lin pri la tago de la krevado, pli precize pri la avo. Nome antaŭ cent jaroj la avo partoprenis la interbatiĝon en Kőrmöc<sup>25</sup>, kie ses ŝafistojn tradraŝis kvindek kamparanoj. Nome la avo portis la pelton tie. Iu forte ekkaptis la pelton, kiu pro tio disŝiriĝis. La kreviĵo videblis sur la dorso de la pelto. Ĉe la poŝo de la pelto estas alia truo, kiun muso kaŭzis. Grasomakulo videblas sur iu flanko, kiun kaŭzis tiu okazaĵo, kiam Lapaj kaj lia edzino interkverelis kaj la sinjorino ĵetis la grasopoton al Lapaj. Sub ties akselo estas iu verda makulo, kiu devenas de la verda jupo de lia patrino. Super la poŝo videblas iu tubero, kies deveno estas sekreto, sed tamen estas sciata, tien estas kudrita iu ege seka du vostojn havanta lacerto, kiun oni trovis dum la nokto de la tago de sankta Georgo. Tiu gardas la mastron de la pelto kontraŭ ĉiu fiulo, fantomo, malicaĵo, satana forto. Ĉi tiun pelton li ekskuis por liberigi tiun de la pluvogutoj kaj de malpuraĵoj. Tio ne estus malbono, se neniu ofendiĝintus. Sed tiu

---

<sup>25</sup> Pri Kőrmöc, slovakia setlejo, vi povas legi en: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kremnica>

faro estis ofenda por iu, kiu kuŝis en la angulo de la kabano. Tiu estis iu infano, kiu ofendiĝis pro la disŝutitaj akvogutoj. Pro tio la infano forte komencis kontraŭplori.

Lapaj ektimis, faligis la pelton, kiam elfalis el lia buŝo la pipo. Bedaŭrinde la pipo rompiĝis, sed la pelto ne havis malbonon. La rompo de la pipo klarigis al li la efemerecon, sed la malfeliĉo estis pli malmulte, ol la surprizo.

Unue li volis forkuri, kiel frenezulo, sed prefere li levis la pelton, fingrumis la sekan lacerton, efike de tio iĝis kuraĝa. Li klopodis fari lumon per kandelo kaj alumeto, kio okazis malfacile, nome liaj manoj tremetis.

Finfine iĝis heleco kaj malkuraĝe kiel iu infano li turnis sin al la angulo, de kie aŭdeblis regula snufado. En la angulo sur fojno iu infano kuŝis en vindotuko.

La eta vivaĵo havis larĝanazan vizaĝon, ties buŝo moviĝis, ties manoj moviĝis libere. La grandaj okuloj de la infano scivole rigardis al Lapaj. Larmoj de la infano, aŭ la pluvogutoj brilis sur la infana vizaĝo, kiel la roso sur iu floro.

Lapaj neniam vidis similan.

– Hm! – li murmuris kapbalancante. – Mil diabloj! – Li diris laŭte konsterniĝante.

Li longtempe kapbalancus, sed lia eta gasto denove komencis plori. – Ni lasu tiun kriegi, ja tiu havas sufiĉe multe da kaŭzoj. Ties patrino tie estas en la akvo de la rivero mortinte. Krome la infano ne kuŝas en riĉa lulilo.

Ĉion ĉi pensis nia heroo kaj ankaŭ li kuŝiĝis en la alia angulo de la kabano por ripozi. Li estis indiferenta en la silento, sed la bebo pli baldaŭ enuis pro la silento kaj denove komencis plori. Li devis levi la bebon kaj komencis balanci tiun por dormigi. La vento vidante ilin ridis, dirante: „Ho, ja! La moroza Lapaj lulas iun infanon!” Sed la bebo pli forte ploris, ol antaŭe.

Lapaj komencis esti malpacienca. Li komencis sakfluti tiom entuziasme la belajn kantojn al la infano, kvazaŭ naŭvilaĝa loĝantaro aŭskultus ĝin.

La infano vere ĉesigis la ploron, ludadis per siaj fingroj sur la vizaĝo de Lapaj. Lapaj eksentis la malvarmon de la tuŝoj de la infanaj fingretoj. Nu, li prenis la malvarmajn fingrojn, kiuj estis kiel glacio kaj li komencis tiujn varmigi per siaj spiroj:

– Ej, vi, eta bebeto! Mi ne ŝatus, se vi frostiĝus ĉi tie!

Dume mateniĝis, la infanon ne interesis la fluto-muziko, tiu ekde longe ploris.

– Diablo portu min, se mi ne komprenas la lingvon de ĉi tiu knabineto. Nu, nu, ne ploru, mia karega panereto!

La moroza Lapaj ellernis dorlotade kaĵoli la bebon.

– Nu, ne ploru! Ĉu vi vidas la sunleviĝon? La suno ne ploras. Ankaŭ vi ne ploru! Oĉjo Lapaj amas vin, se vi ne ploras.

Sed la dorlotado ne estis efika, tamen nun okazis miraklo. Lapaj divenis, ke la infano ploras pro malsato.

Lapaj iĝis ege eltrovema. Li ekvidis la knabon, kiu kutimas kaprojn peleti. Li metis la infanon sur la fojnon, li kuris post la knabon, postatingis tiun, kunportis la knabon kaj la kaprinojn al la kabano.

– Atentu Matjo – li diris al la knabo. – Pelu ĉi tien la kaprinojn kaj rapidu en la vilaĝon kaj diru al la juristo, ke ĉi tie neniu malbono estas, sed iu portis en mian kabanon iun infanon. Tiu infano estas ege vigla, sana kaj mi petas sendi iun maljunulinon, kiu estu patrino de la bebo. Hastu! Posttagmeze venu reen!

La junpaŝtisto volonte plenumis la peton de Lapaj, li estis fiero povi aranĝi la aferon de la vilaĝo. Iŝtók melkis la kaprinojn, trinkigis la bebon. Dum la trovita infano ŝmacadis la lakton, Lapaj bone amuziĝis, kvankam la tasko estis malfacila. Poste la bonsatigitan bebon li metis sub la liberan ĉielon, kie la suno varmigas ĝin. Tie la bebo ekridis. La kampogardisto sentis, ke tiun nun iu interna varmo varmigas, kiel same varmigas lin iu agrabla intima varmeco.

– Kiom stranga, mirinda bruto estas tiu bebeto!

Poste tiu stranga estaĵo movis siajn brakojn, kiel birdeto siajnflugilojn. La bebo volis flugi al Lapaj, efike de tio Lapaj levis la infanon, kisis ties ruĝajn vizaĝojn. La barbo de Lapaj pikis la vizaĝon de la bebo, sed tiu ne ploris pro tio. Lapaj ege ĝojis, ke la bebo ne ploras.

– Jes, jes, mia sciureto! Lapaj amas vin tiam, se vi ne ploras. Ĉu ankaŭ vi amas min?

La bebo rigardis lin, kvazaŭ ĝi komprenus la demandon kaj dolĉe palpebrumis. Iŝtók iĝis infano nun por ŝato de la infano. Li kunportis la bebon al la rivero por aŭskultigi la muĝon de la akvo. Poste li kunportis ĝin sur la altan rokon. Li kolektis florojn en la arbaro por ĝi kaj li montris al tiu birdonestojn. Ili bone amuziĝis. Tempe de la posttagmeza manĝado ili reiris al la kabano. Tiam alvenis la junpaŝtisto por la kaprinoj kaj iu maljunulino por la bebo.

La ŝrumpa maljunulino, kiu estis akuŝistino de la vilaĝo, jam kriis de malproksimo:

– Hej, mia filo, Lapaj! Donu al mi la infanon por konstati ĝian devenon. Tio estas mia afero. Mi deziras bonan tagon! Kie estas la infaneto? Lasu ĝin kunporti. Mi esperas, ke vi donacos al mi kelkajn brasikojn. Metu tiujn en mian sakon.

– La infaneto dormas, – diris Lapaj – mi ne lasas ĝin veki.

– Ĉu? Ĉu mi ne povas ĝin veki? – ŝrikis la maljunulino. – Ĉu mi atendu ĝis ĝi vekigĝos? Ej, mia filo, vi estas fiera pri tiu infano. Ĉu tiu estas princo, aŭ princino?

– Ŝi estas filino, mia onjo, Agnesa. Foriru! Mi ne lasas ŝin veki. Nun ŝi ekdormis. Pli frue ŝi ploris.

Kaj la sovaĝulo forpuŝis la maljunulinon kaj tenere rigardis la dormantan infaneton. Li sidiĝis apud tiun kaj pipfumante aŭskultis la snufadon de la infano.

– Kiun malbonon vi havas, mia filo Lapaj? Ĉu vi freneziĝis? Rigardu la homoj! Vi estiĝintus bona vartistino, kiu tion diras, ke la infano ne povas esti vekita. Nu, Iŝtók, tio estas freneza parolo. Nome la maljuna Agnesa ne volas pasigi la tempon superflue. Ja, la vilaĝo Hlina estas malproksime kaj povas esti, ke mi ne atingos hejmen ĝis nokto.

– Almenaŭ hodiaŭ ne estos fino de la mondo – diris ridante Lapaj laŭ la onidiro miljara, kiu signifas, ke tiam ne estos fino de la mondo en la lando, kiam la forirantaj slovakaj samvilaĝanoj de Hlina estos kune en la vilaĝo. Laŭ tiu teorio la mondo estas eterna.

– Ne ŝercu pri ni maljunulinoj, Lapaj, ĉar vi havos malbonon. Vi estas nur sesdek-jara, sed mi estas pli aĝa, ol vi, mi baptigis vin. Ne restigu min, sed donu la bebon, ĉar alie mi skarpos viajn okulojn.

La maljunulino certe farus tion, sed la infano vekigis kaj ili ĉesigis la disputon.

Lapaj levis la infanon el la ombro de la arbeto, kaj aldonis tiun al la maljunulino. Li iĝis preskaŭ malgaja, ene proprecaj sentoj bruis, al lia animo ia laciga, deprima nebulo peziĝis.

La etinfano maltrankvile movis sin sur sia loko. Timeme ŝi rigardis al la malgrasa maljunvizaĝa sinjorino transprenanta ŝin kaj ekploris, manojn etendis al Lapaj, al li volante iri. Lapaj ne povis kontraŭstari, ke refoje li ne brakumu ŝin. La senfeliĉa eta kreitaĵo ĉesis plori kaj strikte alpremiĝis al la brusto de la krudakaraktera homo. Povas esti, ke ŝi sciis, sentis, ke de tie ekde longe profunde kaŝita varmeco elradias. Ŝi trabrakumis lian kolon tiom strikte, ke li sentis la forton, kaj kiam la virino perforte volis forigi la manojn de la etulo, ŝi ŝrikante ligiĝis al li pli strikte tenante sin. Infana inklino restas ĝis la fino.<sup>(Z)</sup> Lapaj estis emociita, liafrunte la vejnoj estis pufiĝantaj, li ne estis kapabla diri eĉ unu vorton. Li nur mansignis al la virino, ke ŝi ne tuŝu la infanon. Lia koro laŭte batadis, liaokule aperis larmoguto.

Dum li brakumante tenis sian malpezan ŝarĝon, liaj okuloj rigardis la teron, kvazaŭ li volus peti konsilon de tiu nigra terbulo, kiu kaŝas la forĵetitan tritikosemon kaj ĝin plenkreskigas.

Kaj ĝi certe donis al li la petitan konsilon, kiun li demandis de ĝi.

Tute trankvile li paŝis al Agnesa, sian manon metante al ŝiaj ŝultroj kaj de la emociiĝo molaj, sed per vortoj senhezitaj, deciditaj li diris:

– Mi pensis alian, onjo. Vi povas reiri.



- Kion vi pensas, kiel vi komprenas tion, mia filo Lapaj?
- Tiel, ke la infanon mi ne donas. La infanon Dio donis al mi, do estu la mia.

Poste, li turnis sin de la mireganta sinjorino kaj per silentaj paŝoj, trankvile li reiris en sian kabanon.

La decida vorto estis eldirita. Li iĝis patro. La nebulo de la patraj zorgoj sidiĝis sur lian frunton. Karegaj zorgoj, malfacilaj zorgoj. Karegaj zorgoj al la riĉuloj, pezaj al la malriĉuloj. Dum la nokto ne venis, dum la infano ne iĝis malsata, dum ŝi ne komencis senti la malvarmon, la afero iris glate. Sed li vane regalis per la manĝaĵrestaĵo la infaneton, vane li kovris ŝin per la felto, sed poste? Li sciis jam, ke por la infano li bezonas kaprinon kaj kelkajn kusenojn por havi ĉiam freŝan varman lakton kaj varman liton. Ĝis la noktomezo li maldormis pripensante kiel akiri la necesajojn, sed je la tagiĝo naskiĝis lia decido unue malagrabla, suferiga, poste tamen kontentiga. Jam frumatene surbrakon prenante la knabinecon, per longaj paŝoj li ekiris al la vilaĝo, kiel la hastaj gigantoj de la fabeloj de la slovakoj, kiuj paŝis de unu monto al la alia. Li iris haste kun sia sakfluto sub sia akselo kaj jam baldaŭ frapis ĉe la pordo de la juda Elio. Li estis malserena, sed sciis, ke li devas akiri la necesajojn ankaŭ tiam, se li devas skrapii tiujn eĉ de la tero, ja li bezonas tiujn ĉiumaniere. Elio timiĝante vekigis pro la brua frapado.

- Kiu vi estas ekstere, kion vi volas, kiam ĉiuj dormas ankoraŭ nun?
- Malfermu la pordon Elio, estas mi Lapaj.
- Mi malfermas, nature. Kaj ĉu ĉi tiu infano? Ĉu jam ankaŭ ĉi tia kreskaĵo produktiĝas ĉe vi?
- Jes ja, vere, sed nun ne demandadu, sed bruligu fajron en via forno kaj donu lakton.
- Baldaŭ jam klakis la fajro kaj la infano gaje ŝmacis la lakton.
- Elio, – li per fingro montris al la sakfluto – mi vendas ĝin.
- Kion vi vendas?

Lapaj havis tiom da kordoloro, ke li ne kapablis eldiri la vorton sakfluto, nur tremetamane li montris denove al sia muzikinstrumento.

- Nu, ĉi tiun – diris li malakratone, obtuzavoĉe.
- Kio? Nun neniu volas aĉeti ĝin, eĉ ne por kvin groŝoj kaj ĉu nun vi volas vendi la sakfluton?

Sur la vizaĝo de Lapaj speguliĝis terura deprimado je ĉi tiuj vortoj. Li malgaje rigardis al la etulo, sian kapon li kurbigis malsupren kaj suspiris profunden. Sed mi pensis Elio, ke vi aĉetos, ĉar mi donus tre malmultekoste pro ĉio, ke mi havas nenion alian.

- Kion vi petus pro tio?
- Du kusenojn, unu varman subaĵon subtalian kaj unu vivantan patrinkapron – li diris timeme, kvazaŭ ankaŭ li mem same trovis troaj la petitaĵojn. Elio vestis sin en la vesto de la homamikaj sentoj, kiu ne estis bone elektita al lia ruza ruĝa vizaĝo.
- Ĉu vi scias, kio estu? Ĉar mi estimas kaj ŝatas vin, kaj ĉar hieraŭ mi malpaciĝis kun mia edzino, kaj ĉar frumatene la menso de la judo ne klaras, pro ĉio ĉi mi volas bankroti, jen mia mano, donu ankaŭ la vian kaj farotas la negoco.

La deziritajn aĵojn li ricevis baldaŭ. Istók larmis, kiam li adiaŭis sian ŝatatan sakfluton. De la sojlo li reiris unu fojon por ludi sian plej ŝatatan kantomuzikon. Ĝi sonis tiom bele, kiel ĝis tiam neniam. Pokolka iĝis vera feino, kiu preskaŭ ekdancigis ankaŭ la maljunan Eilon mem, dum la infanan vizaĝon brilis ĉarma rideto. Tiom belis ĉi tiu rideto, ke Lapaj forgesinte pri ĉio, unubrake albrakumante la etulon, aliabrake li preninte la kusenojn, tre gaje klopodis hejmen al sia loĝloko – nomite „Laz” (lazoj<sup>26</sup>)-on.

<sup>26</sup> Laz, Lazy (lazi, lazoj) estas etaj setlejoj en arbaroj havantaj du, tri domojn, ili ne estas partoj de vilaĝoj aŭ urboj.

Estis bela aŭtuna mateno. La infano, dum ilia tuta voĵiro, sur liabrake sidante provbalbutadis ion, la kaprino, irante antaŭ ili, ŝajnis, kvazaŭ ĝi respondus tion kaproblekis fojfoje, dum li mem tiom volonte aŭdadis ambaŭ, kvazaŭ li komprenus ilin.



Porkopaŝtista koncerto en Ipolyság: La plej bona sakflutisto – Foto, gazetdetalo, 1910  
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=80749>

## Neniĝo de la bando de Jastrab

Tie sur la kolona vestiblo sidas kaj nature pipfumas la nobela moŝto Stefano Gerge. Ĉar kiam li ne pipfumas, li blasfemas ĉiam, sed ĉar li pipfumas ĉiam, li estas diotima, pia homo. Alie, la blasfemo apartenas kiel ilo al lia profesio, ja sinjoro Stefano Gerge estas la policisto de la departemento. Nu, li estas tia policisto, kies famo disvastiĝas ne nur al sepoble sep departementoj, sed ĝi efikas ankaŭ sur eksterajn landojn.

Li havas ege klaran menson, se oni ne konstatus tion nur laŭ lia aspekto; li havas etajn kaj grizajn okulojn, la hararo de la maljunulo estas tondita mallonga, li razas al si siajn lipharojn kaj barbon; kun lia nazo montranta malsupren kaj kun lia mentono ŝajne pikanta, lia vizaĝo pli similas al birdo ol al homo. Sed malgraŭ sia sensignifa eksteriĝo, li estas vera leono, nevenkebla, kuraĝa kaj tenaca. Li estas la teruro de la rabistoj, la fierego de la reputacia departemento, kies servon iufoje eĉ ankaŭ la imperiestra moŝto mem bezonis. Ĝi estis ia tre grava kaj komplika kriminala afero, pri kiu ankaŭ la imperiestro petis informojn, kiujn la viena policistaro ne povis elspuri dum longaj monatoj post kio la reganto, koleriĝante pro tio, turnis sin, laŭ la konsiletodonanto Adamo Reviczky, al sinjoro Stefano Gerge kaj Lia Ekscelenco estis portita tiam en la luman imperiestran rezidan urbon. La viena poliestro kaŝe, inside, moke subridis lin:

– Nu, ja ĝuste tiu povos solvi la bovaferon, kiam tiu eĉ moviĝi ne povos en la ĉi-tieaj zigzagaj stratetoj! Li havos bonŝancon, se li povos hejmeniri de la strato al sia loĝejo. Kia penso estis de lia Imperiestra Moŝto, ke li portas ĉi tien tiun mallertan superan juĝiston? De kie li povus priflari la solverojn de la farendaĵoj, kiam niaj nazoj sentis nenion? La poliestro permesis al si tiun lukson por ke li antaŭhelpu la fiaskon de la hungara policisto. Li kaŝdungis du ĉiutagajn policistojn por vesti sin friponoj kaj tiel forŝteli la klepsidran<sup>27</sup> poŝhorloĝon de la hungara policisto, por ke Vieno estu por li ĉiumaniere neforgesebla ĝismorte. Sed, kiam la poliestro disdonadis siajn koncernajn ordonojn, neatendite alvenis sinjoro Gerge kun la vortoj:

- Kolego! Estas trovitaj la bovoj!
- Ne ŝercludu sinjoro! Kiel vi eltrovis?
- Tio estas mia sekreto!

Nome temis pri tiuj mil bovoj, kiujn donacis kiel vivantan viandon, la departemento Szatmár<sup>28</sup>, al Lia Moŝto Francisko la unua<sup>29</sup>, kiel imperiestro al la milito kontraŭ Francio, kaj pri kiuj okazis tre stranga afero post ilia morto. Nome la mil bovoj pezis nur 500 kvintalojn<sup>30</sup> da viando inter la manoj de la nutradaj kompanioj kaj nur 190 pecojn da ledoj.

Tiel evidentiĝis, ke iuj bestoj ne pezis pli multe ol 50 funtojn, kaj la okcent dek pliaj bovoj senhaŭte piedtretis iam la koton de nia tera vivo.

La imperiestro iĝis kolerega, kaj per siaj ordonoj li ekmovis la poliestron, la esplorjuĝiston, sed vane, ĉar tiuj nutradaj kompanioj ĉirkaŭigis sin per tioma malhelo, ke estu tre saĝa kaj sperte rafinita homo kiu kapablas enigardi ĝin.

---

<sup>27</sup> La klepsidro estis praa tempomezura ilo. Ĝi jene aspektas:  
[https://nat2012.nkp.hu/tankonyv/fizika\\_9/lecke\\_01\\_002](https://nat2012.nkp.hu/tankonyv/fizika_9/lecke_01_002)

<sup>28</sup> Pri la nomita departemento vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Distrikto\\_Satu\\_Mare](https://eo.wikipedia.org/wiki/Distrikto_Satu_Mare)

<sup>29</sup> Pri la imperiestro Francisko la unua bv. legi ĉe:  
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko\\_la\\_1a\\_Stefano\\_\(Sankta\\_Romia\\_Imperio\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko_la_1a_Stefano_(Sankta_Romia_Imperio))

<sup>30</sup> Unu tuno estas 10 kvintaloj da pezo.

Gerge estis tiu homo; post sia alveno ene de dudek kvar horoj li eltrovis kio okazigis la korpan malmultiĝon de tiuj mil pecoj da bovoj. Bedaŭrindas, ke tiu historio ne apartenas al ĉi tiu.

Pri la mil bovoj krome nur tiom, ke ilian historion eternigis ne nur la historio, ne nur la „Pitaval”<sup>31</sup> parolas pri ili, sed ĝi estis bona temo ankaŭ al la poezio.

Kiam la reganto, nelonge post ĉi tiu proceso, nomumis novan ĉefprefekton al la avano de la departemento Szatmár (satmar), inter la tiuregionaj korporacioj kaj nobelaj klasoj tiu sprita poemspecio<sup>32</sup> komencis cirkuladi:

„Mil bovojn sendis Szatmár al la imperiestro,  
Sed la imperiestro sendis tial, nur unu, al Szatmár.”<sup>33</sup>

Cetere ĉi tie temas ne pri la bovoj, eĉ ne pri Lia Moŝto, aŭ pri la Szatmárdepartementaj nobelaj ordenoj, sed pri la heroaĵoj de sinjoro Gerge. Multaj bravaĵoj estas konataj ankaŭ hejme, ili disvastiĝis kiel la onidiroj. La plej lastaj tri estis grandvaloraj, la kaŝobservoj de la pozicioj de tri persistaĉaj vagantoj.

La ĉefjuĝisto ne povis havi bonrezulton, ja ili ne volis konfesi siajn pekajn agojn. Ili staris antaŭ li mute, obstine, kiel pretaj eĉ al tio, ke iu tranĉu rimenon el lia dorshaŭto, anstataŭ konfesi almenaŭ iom. La ĉefdistriktestro enuis pro la vana penado tri tagajn kaj forsendis ilin al la policisto sinjoro: havu ankaŭ li koleradon.

Sinjoro Stefano Gerge ĝuste tiam sidis en la granda konsilantarejo paroladante kun la asessoroj, kiam la hajduko anoncis, ke ĉi tie estas la tri mutuloj, kies famo jam disvastiĝis en la urbo, kie oni rakontas pri ili diversajn aventuraĵojn. Ilia silentado flikis iliajn ĉifonojn per koloroj de la romanesko. Multuloj estis scivolemaj, kiuj ili povas esti.

Ĉu ne tiu bandito nomita Marci Zöld (marteno verda) povas esti unu el ili, aŭ Miŝka Szellő (mikelo venteto) la bandito de la Ebenajo, aŭ eble ne mem la reĝido dana, kiu en maskovestaĵo venis ĉi tien kun sia akompano por ekkoni la fraŭlinojn Majornoky – kiel tio kutimas en la popolfabeloj.

– Enportu ilin! – li ordonis al la hajduko.

La tri minacaspektaj fraŭloj envenis.

– Kiel vi nomiĝas? – li demandis unu. – Kiu vi estas?

Nenia respondo. Kun sensenta, senesprima vizaĝo regapis la fraŭlo al la reputacia sinjoro, kvazaŭ li estus ne nur muta, sed ankaŭ surda.

– Ej, do vi du, kiuj vi estas?

Ankaŭ ili ne respondis.

Sinjoro Gerge skrapis sian griziĝintan barbeton kaj diris afable:

– Ne gravas, karaj miaj filoj, iel ni konatiĝos unu kun la alia.

Poste li turnis sin al la hajduko:

– Voku tri policistojn!

Tuj sin prezentis ĉiuj tri.

– Kaj Vi, miaj karegaj filoj, se vi jam ne volis diri kiuj vi estas, mi ne trudos – diris li al la nekonataj vagabondoj – sed vi stariĝos en unu-unu angulon de la ĉambrego, turnante vin al la muro, malantaŭ vi ĉiuj staros unu policisto kun pafiloj ŝargitaj kaj laŭ tiu ordono mia, ke se vi kuraĝos ekmoviĝeti antaŭ ol mi ne permesos fari tion, ili mortpafos vin. Ĉu bone estos ĉi tiel miaj karegaj filoj?

<sup>31</sup> La Pitaval estas literatura ĝenro, kiu kolektas la specialajn, interesajn krimagojn ne bone prijuĝitajn de la juĝejoj. Ilian rolon transprenis la dokumentofilmoj kaj krimfilmoj – niaepoke.

<sup>32</sup> Temas pri kanto, verso (karmen) simila al odo.

<sup>33</sup> Ĉi tie, bovo estas nomita la ĉefprefekto – kio estis vortoludo.

Lia voĉo estis mioldolĉa pro la afableco.

Poste li vere starigis siajn arestitojn en la anguloj de la konsilentara ĉambrego. Dum li brakumante du departementajn sinjorojn komencis senzorge promenadi tien-reen en la ĉambrego, deklarante la neceson de la napoleona milito en la putriĝanta Eŭropo, li ŝajnis forgesi pri ĉio, kio estas ankoraŭ en la mondo, – subite li elŝiris sin el la brakoj de la du promenantaj sinjoroj kaj altvoĉe li kriis ĉambregomeze:

– Halbrechts! /Duondekstren!/

Al la konata komandvorto, el inter la tri vagabondoj, du turnis sin mekanike.

– Nu, bone. Ni jam konas unu la alian. Vi estas regulaj soldatoj! El kia regimento vi estas?

Nun jam ne estis eble nei ion ajn. La fraŭloj konfesis la tutan aferon: ili enuis pro la fiksa, ĉiama, senvaria soldatpano, kaj ili foriris tiel de la infanteria regimento, ke al la sinjoro kapitano ili forgesis avizi.

La sinjoro ĉefjuĝisto tre miris, kiam apenaŭ pasis duonhoru kaj sinjoro Gerge jam resendis al li ĉiujn liajn tri malliberulojn pridemanditajn, du homojn por akompani al ilia infanteria regimento (laŭ la farita protokolo), la trian li proponis transsendi en tiun brilsencan konstruaĵon en kiu restadas multaj friponoj atendantaj la juĝistan verdikton, pri kiu kaj la korvo, kaj la korako anoncas, ke en la tuta departemento ĉi tiu estas la plej necesa konstruaĵo.

Ĝin plenplenigis fiuloj, kanajloj. Jam antaŭ dudek jaroj sinjoro Gerge enpopoligis tiun. Je la unuaj jaroj de lia oficokomenco, la publika sekureco estis malofta, ŝanceliĝanta. Ne nur la proprdepartementaj rabistoj kaj betjaroj damaĝadis, sed ankaŭ el la najbaraj departementoj malriĉaj fraŭloj travenis por kelkaj malmultekostaj aventuroj. Inter tiuj rilatoj la nova policista leutenanto ne eluzis la malnovajn artifikojn jam senefikajn, ĉar li pensis, ke li devas eltrovi ion novan.

La malnova elvoka ago signifis, kvazaŭ la homo de la policistoj amikiĝus kun la rabistoj, tiu rabis kune kun ili, poste li rakontis la planojn al la registara komisaro. Sed ne certas ke iu rakontis ĉion, ĉar tiumaniere malofte okazis malliberigo.

Nu, Gerge turnis iom koncerne la praan kutimon. Li sendis al ili ne propran homon, sed ilian homon li akceptis al si. Tiu ne estis alia, ol la fama luktisto: Matyej Szlimák (matjeĵ slimak), el la bando de la timiga tot-a rabisto nomita Jastrab, kies estis la plej malnova bandito-grupo, havanta grandan estimon antaŭ la rabistoj, la publiko kaj la estiminda departemento.

Gerge jene alparolis la kaptitan banditon Matyej Szlimak:

– Ej, kiom bedaŭrinde estas al Vi laborema fraŭlo bruliĝi ekstere sub la suno, kie neniuj vidas vin, en la arbaro, kie neniuj gapas vin. Vi estas kuraĝa homo, mia filo, Matykó (matjko, Matiaso), ankaŭ Dio vin kreis por esti soldato. Tie vi havus bonan lokon. Mia karega filo, nun eĉ ankaŭ la tuta departemento pelas vin, sed tie eĉ la reĝo levus la ĉapon antaŭ vi. Forte batis la koro de Matyej pro ĉi tiuj kelkaj vortoj kaj li profunde suspiris:

– Tio estus bona al mi, sinjoro komisaro!

– Tie oni mezuras la gloron per mankavoj ... Ĉu vi aŭdis pri Paŭlo Kinizsi<sup>34</sup>? Li kiel muelisthelpanto iris al la armeo kaj nur malmulto mankis, ke li finis kiel reĝo.

Matyko anhelis pro la volupto, lian animon tiklis ĉi tiu parolo.

– Tio estas la belega vivo, mia filo Matyko<sup>35</sup> – sinjoro Gerge kondukis plu la imagon de Matyej – kiel viaj popolfabeloj rakontas, – tie anstataŭ seka pano vi manĝas grasajon kaj trinkus fanditan buteron soifante. Kaj kiam vi kuŝus por ripozi, naŭ ordinaraĵ piedsoldatoj forpelus de vi la muŝojn.

---

<sup>34</sup> Pri Paŭlo Kinizsi, vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Pa%C5%ADlo\\_Kinizsi](https://eo.wikipedia.org/wiki/Pa%C5%ADlo_Kinizsi)

<sup>35</sup> Matyej (matjeĵ) kaj Matyko (matjko) estas la karesnomoj de Matiaso.

- Venigu min tien, mia komisaro! – raslas Matyej Szlimák retenita-voĉe.
- Tio ne okazas facile, rapide, mia kara filo Matyko. Nun vidu, vin oni enprizonigos nun eble por dek jaroj. Post dek jaroj, se ni vivos, ni povos paroli pri ĉi tio. Sed, kiam vi liberiĝos, kia estos jam tiam vi, eble la ombro de via nuna stato.
- Szlimák ege malgajiĝis. Li distriĝeme puŝadis malsupren kaj supren la kupro-bukan, unu kaj duonan spanojn larĝan zonon.
- Ĉu pri tiu stato ne eblas helpi iel?
- Ho, tio estos malfacila, kvankam mi amas vin tiel, kiel mian karegan fraton, mi ne scias kial, sed mia skribisto jam prezentis al la departemento la oficialan anoncon, ke vi estas kaptita.
- Ho, tio estas jam eraro, granda eraro – murmuris nazvoĉe Matyej, kaj pizograndaj ŝvitgutoj aperis liafrunte.
- Gerge agis tiel dum iom da tempo, kvazaŭ li pensadus, poste subite li batis sur la ŝultron de Matyej, kvazaŭ li estus nun decidinta pri io:
- Vi ne estas fiulo, Matyej – diris li fervore kaj tamen solene.
- Matyej fermis la okulojn kaj kapjesis, ke li ne estas fia homo.
- Vi ne trompos min!
- La rabisto etendis la manon al Gerge, tiun lian manon, per kiu ĝuste hieraŭ li senhaŭtigis la bovinon ŝtelitan de la judo de Lešt.<sup>36</sup>
- Jen mia honesta manpremo!
- Mi sciis, ke vi estas honestulo, tial mi decidis purigi vin de la kulpoj, metante vin kiel sinjoron. Kiel mi premis vian manon, samtiel premos vian manon la estiminda departemento. Sed manpremo ne povas okazi sen tio, ke ankaŭ vi devas etendi vian manon ...
- Lasu min aŭdi, kion mi faru – diris Szlimak malhelanime.
- Vi povos pridiri ĉiujn viajn kazojn, vi alkondukos min al la restadejo de viaj kunuloj, por ke ankaŭ el tiuj mi povu subskulpti iom. Vi rakontos kiujn aĵojn vi ŝtelis, rabis kun viaj kunuloj, kien vi metis tiujn, ktp. Vi reiros al la bando de Jastrab, vi estos ilia bona kompano kiel ĝis nun okazis, vi ŝtelos, rabos, ekscesados, kaj sabate vi venos al mi por vespermanĝi kaj dume vi rakontos ĉion.
- Kaj kio estos post tio? – urĝigis lin Szlimak, per siaj grandaj elstreĉiĝintaj okuloj strikte rigardante al Gerge.
- Unu jaron vi servos ĉimaniere la departementon. Post unu jaro pasos la lasta sabato, kiam mi prezentos viajn utilajn servojn al la vicprefekto, kiu eksigos vin de ĉiuj persekutoj.
- Kaj kio okazos post tio?
- Post tio aŭ mi mem portos vin al la regimento, aŭ vi portos de mi tiun rekomendan leteron en via talizono, ke oni tuj nomumu vin kaporalo.
- La okuloj de Matyej ekbrilis, kaj sian fortikan polmon li frapis ankaŭ duafoje en la mankavon de Gerge.
- Mi akceptas la kondiĉojn, mia sinjoro komisaro. Hundo, kiu kontricias.
- Okazis ĉio same. Matyej ne malplenumis sian promeson. Li fidele raportis al policistleŭtenanto la sinjoro pri ĉio, pro kio dum duonjaro la bando de la kompatinda Jastrab tre malgrandiĝis. Oni kaptis po unu ĝiajn ĉefhomojn, kiujn sinjoro Gerge facile povis pridemandi, ĉar li tre embarasis ilin per sia ĉionscio.
- Nu, mia filo, kion vi ŝtelis? – kutimis demandi la policisto unu-unu kaptitan ulon.

---

<sup>36</sup> Lešt estas soldata distrikto en Slovakio, ĝis 1950 ĝi estis memstara vilaĝo:  
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Armea\\_Spaco\\_Le%C5%A1%C5%A5](https://eo.wikipedia.org/wiki/Armea_Spaco_Le%C5%A1%C5%A5)

– Nenion, estiminda sinjoro. Kurbiĝu mia fingro, se mi estis ne pro devigo ĉe la bando de Jastrab. Mi ne apartenas al ili.

– Min vi ne superruzos, kara mia filo, ĉar mi scias ĉion, kaj se mi demandas vin, mi faras tion por vidi, kun kia pentto, kun kioma bedaŭro vi konfesas viajn erarojn. Superflue estas sekreti tiujn antaŭ mi! Eĵ, do, ĉu ne vi forŝtelis la porkidojn de la respektinda sinjoro reverendo, je la Kandelfesto<sup>37</sup>. Same vi forportis la ok junŝafinojn el la ŝafejo de Hlina, dum la dua tago de la pasintjara Pasko. Vi senhaŭtigis ilin en la nigra farmo sub la granda akacia arbo per la tranĉilo de Ištók Madzag. Poste vi bakis ilin en la kaldrono de la Ŝafmastro Vrecjar, iliajn ledojn vi metis sur la subtegmenton de la muelisto de Surdok, kie ili estas ankoraŭ nun. Ĉiuj ok! Ĉu mi diru pli multe?

– Ne, ne! – siblis tiumomente la pridemandita akuzato, neniigante. – Vi scias ĉion... ĉio okazis tiel.

Dum inter la tót-aj (slovakaj) popolanoj disvastiĝis la famo pri la ĉioscianta policisto. La ŝtelistoj, la rabistoj kaj la friponoj iĝis plenigitaj per terure granda timo. Tiu superstiĉo disvastiĝis diskonigante, ke sinjoro Gerge ŝmiris siajn okulojn per la hepato de la centjara lacerto trovita je la Tago de sankta Georgo, kaj pere de tio la policisto kapablas enigardi tra la homa korpo en la korojn kaj tie ellegi la nevideblajn literojn, per kiuj estas skribitaj la sekretaj agoj.

Ne nur unu fojon okazis, ke iu estis enportita pro ia simpla afero, sed la akuzito neatendite komencis konfesi pri pli grava afero. Okazis foje, ke iu estis asignita pro anserŝtelo, kaj subite li komencis paroli pri tio, se li estas jam ĉi tie antaŭ la policisto, kiu scias ĉiukaze pri ĉio, ĉar kial turni kaj tordi la aferon, ankaŭ konfesi la veron, do li konfesu, ke li ankaŭ murdis la poŝtiston de Zehere.

La lerta sistemo de Gerge dum mallonga tempo purigis la tutan altlandon de la rabistoj, nur la estron mem, Jastrab-on li ne sukcesis kapti: artifiko, intrigo, insido ne damaĝis lin, ĉar li estis duoble pli ruza, ol la departemento.

Li ekscesadis, damaĝadis tie en la arbaroj, inter la montoj kaj ne eblis lin allogadi de tie, neniamaniere. Tio, ke tie li estis la sinjoro, tio estis grava afero, kaj tio same, ke al la vido de la cent, lin pelantaj policistoj, survivage eĉ nek lia brovo kaj nek unu lia vizaĝtraĵo tiriĝis.

Lia romaneska patrono estis la altlando kaj gardis, savis lin de antaŭ la policistoj: la breĉoj de grotoj, la fendoj de rokoj kaŝis Jastrabon de antaŭ siaj persekutantoj.

Mi povus rakonti, kiaj sinmontremaj, streĉatantaj strebadoj, tamen vantaj kaj vanaj agadoj okazis por kaptakiri lin, sed por ne multigi la vortojn mi rakontas nur tion, ke sinjoro Gerge ege koleris ĉiufoje, kiam la kaptaj provoj fiaskis. Ja li diris: dum la fama rabisto estas en libera stato, se almenaŭ nur li sola, ĝis kiam li ne renormigos la konvenan publikan sekurecon, ne estos ordo.

Foje, kiam li forsendis ĉiujn siajn policistojn al la loko nomita „Laz”-oj<sup>38</sup>, por kapti Jastrab-on, kaj tiuj revenis malplenmane sen li, sed asertante, ke la diablo mem ne povus havi bonan rezulton pri tiu, li paliĝis pro kolerego.

– Vi meritas nur eĉ ne tiom da tindro kiom uzatas por la bruligo de la piptabako! Vi estas senvaloraj! Tuj foriru de antaŭ miaj okuloj! Mi devas foriri!

Poste li pendigis surŝultre la praan familian pafilon, per kiu pratempe la prauloj ĉasis leporojn. La leporoj ne devis timi la malŝargiĝon, tion plie devis timi la uzantoj, ĉar ĝi bonis nur por montri, ke ĝia portanto havas pafilon. Nu, sinjoro Gerge nun ekiris sola, al la

<sup>37</sup> Laŭ la kristanoj: la kandelfesto okazas je la dua de februaro. Festo pri la puriĝo de Maria. <sup>(Z)</sup>: Vidu PIV-on.

<sup>38</sup> Laŭ la dua provleganto Pavol Petrik; la Laz-oj estas du, tri domoj en arbaro, memstara setlejo izolita de iu ajn vilaĝo aŭ urbo.



terurofama imperio de Jastrab, al la arbararo de „Lopata” arbara regiono<sup>39</sup>. La arbaro havis iun akravidan pinton, de kie oni povis enrigardi grandan distancon. Gerge bone sciis el rakonto de Matyej, ke plej volonte, prefere tie restadas Georgo Jastrab, ĉar ankaŭ lia profesio postulas la bezonon, ke li rigardu la vojaĝantojn de tiu punkto, de oriento subrigardanta la pejzaĝon tute ĝis la valo Motuz, norden al la krucojo de Kokava<sup>40</sup>, kaj sur tiu granda tereno li rimarku ĉion, kion la bonŝanco certigas por li.

La sinjoro vere vidis Jastrab-on de malproksimo, kiam tiu staris sur la elstara pinto apogante sin al sia pafilo, senmove kiel ia ŝtonskulptaĵo. Ankaŭ tiu rimarkis, ke venas la disponanto de spur-policistoj de la departemento, sed li sciis, ke tiu vane venas ĉi tien.

Tre facile li povus malaperi de tiu loko, sed al la rabisto plaĉis, ke Gerge venas sola, kvankam li povus esti venanta kun kvindek policistoj. Li sentis, ke ĉi sola veno estas iaspeca esprimo de estimo al lia persono. La fama Gerge volas renkonti la faman Jastrab-on. Estas bone: Georgo Jastrab ne evitos la honestan, egalŝancan lukton, sed enatendos trankvile kio sekvos.

– Kapitulacu! – krias Gerge jam de malproksimo. – Mi venis por vi, mia filo. Mi mem venis, ĉar mi ne pensas vin malnobla, nefidinda, kiu havas eĉ ne ereton de la betjarhonesto. Se iun oni kaptos, estos bone, sed se tiun li ne kaptos, ankaŭ tiam estos bone. Kaj tiu fraŭlo ne kapitulacas al iu ajn ordinara aĉa policisto. Mi konas vin, kara mia filo, vi estas fierega homo, gravas al vi via honesto, tial mi mem venis. Venu do, ne persistu obstine, ne frenezetumu. Mi tiel aprecas Vin hejme, ke en la sino de via patrino vi ne statis pli bone, ol vi estos sub miaj manoj.

La rabisto nur skuis la kapon kaj mallonge respondis:

– Mi konas vin, diable lerta policisto, kaj mi ne kredas vin. Ne venu pli proksimen, ĉar mi alpaŝos vin!

Sed Gerge ne obeis, tamen li iris pli proksimen al Jastrab. Jam apenaŭ dudek paŝoj disigis ilin unu de la alia.

Jastrab minacis lin per siaj du muskolaj pugnoj, poste levis la pafilon, celis kaj eĉ el ambaŭ tuboj li elpafis.

La malgranda hometo, la fama policisto, ne fortimigeble akceptis la kuglojn, kiuj tuj apud lia nazo forstridis, sed eĉ por unu sekundo lin ne forlasis lia mirinda memregado en la danĝera situacio. Al tio li povis danki sian triumfon. En la momento de la klako de la pafo, du plumberojn li elpoŝigis subite, kaj kiam la fumo disiĝis kaj la rabisto alrigardis la ejon kie Gerge devus kuŝi mortpafite, tie li vidis tiun zonitan per la sunsubira sunradio stari fiere kiel gladiatoro kaj kun siaj du levitaj manoj li montras la du kuglojn senditajn en lian korpon.

– Ne turmentu vin plu per tiu pafado, ĉar min, mia filo Jastrab, ne damaĝis ili, ĉar mi estas kuglosekura! – li kriis kun kuraĝa tintanta voĉo. – Vanas konsumi la pulvon! Mi estas kuglosekura, kara mia Georgeto, ankaŭ nun mi prenis ambaŭ. Vidu, jen la du tiel, kiel...

La moroza rabisto ĵetis terurigaŝantan rigardon al la daŭre proksimiĝanta ulo. Poste, tre senesperigaŝinte li ĵetis al la tero sian larĝ-randan tót-an (slovakon) ĉapelon kaj obtuzvoĉe, malakratone li raslas:

– Mi vidas, ke vi estas diablo! Venu do, kaj manĝu min. Mi kapitulacas.

Nia sinjoro Gerge manprenante kondukis hejmen la impetan rabiston, pri kiu tri departementoj ne kapablis atingi sukceson. Dumvoje li regalis tiun per iom el sia tabaksaketo, li batis fajron al ties pipo, kaj kvazaŭ ili estus ĉiam bonamikoj, mildvoĉe li enketis lin pri liaj agoj, kiel iun infanon:


---

<sup>39</sup> Laŭ mia scio tiu Lopata noma arbarea regiono troveblas niatepe en Sudokcidenta Ĉeĥujo – noto de la provlegantino. La vorto lopata signifas: ŝovelilo.

<sup>40</sup> Pri la pitoreska pejzaĝo vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Liptovsk%C3%A1\\_Kokava](https://eo.wikipedia.org/wiki/Liptovsk%C3%A1_Kokava)



- Ej, vi estas ruze artifika homo, Georgeto, ĉu vi rompis perforte la kelon Motošiczky?
- Estu Dio la atestanto, ke ĝi estis ne fermita!
- Mi scias, mia filo! Sed certe ankaŭ en la Grenejo de Bodola<sup>41</sup> viaj manoj agadis!
- Mi neniom profitis el tio, ĉar la greneja tritiko plenplenis je grena kalandrao, la judo ne volis transpreni alie, nur kiel frajtoprezon. Sed, ankaŭ por tio, ke li faru, mi devis bati lin pli frue.
- Ĉiuj ĉi ne estus grandaj aferoj, sed tiu jam jes, ke vi mortbatis vian avon. – Tio neniun koncernas! – eksaltis Jastrab indignante, – ja li estis mia propra avo!
- Veras, mia filo ... vi havas perfektan pravon! Sed, vi scias, ke la departemento terure alie pensadas pri la afero.



Bildoj el la enlanda popola vivo: Slovakoj dum siesto – Gravuraĵo, gazetdetalo, 1865  
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=47485>

Fino

---

<sup>41</sup> Bodola estas vilaĝo en Rumanio.